



中國新道

EL POPOLA

CINIO







INTER NI

La sesa numero (1989) de "El Popola Ĉinio" estas la plej bona el ĉiuj, ĉar ĝi enhavas la solvon de la "konkurso de EPC-amikoj", — la plej atendita revuo.

A. A. Klein (Brazilo)

La rubriko "Amuzoj" okazigos konkurson en la sesa numero de 1990. Estonte, ni aperigos en la revuo ĉiujn solvojn de konkursoj, per kio ni celas laŭdi sukcesintojn kaj intimigi la kontakton inter la legantoj.

La Red.

Mia plej grava plendo restas dum kelkaj jaroj: troa uzo de anglismo kaj neologismo. Tra la jaroj de mia abono, tiu problemo kreskas. Mi miras, ke en la sama numero kun saĝa artikolo pri la avantaĝoj de ĉinstila vortfarado, oni en aliaj artikoloj neologismas... Mi provas esti bona esperantisto, kun fundamenta, Zamenhofa, internacia parolstilo. Mi devas lukti por forigi la anglismon el mia parolo. Kiam tiaj vortoj fariĝas ofte en EPC, iĝas malfacile memori kiuj estas anglismaj, forigendaj, kaj kiuj estas tradiciaj, bonaj Esperanto-vortoj.

D. ROFF (Usono)

Ni dankas Derek Roff pro lia atento. Ni retrorigardos nian laboron kaj faros ĉian eblecon por eviti anglismon kaj neologismon en nia revuo. Ni sincere bonvenigas ĉiujn opiniojn, detalajn aŭ laŭimpresajn pri nia revuo, ĉar ili ĉiuj estas utilaj por ni.

La Red.

Danco sur stilzoj Foto de HAN WUPING



ENHAVO

22 VOJAGO EN LA DELTO DE PERLO-RIVERO (1):

Humen post sia malfermiĝo

32 LAŬ LA SUDA SILKA VOJO (11):

En la malsupra baseno de
Minjiang-rivero

15 Ĉinio helpas siajn malriĉajn kamparanojn

39 ĈINA LITERATURO:

Cao Xueqin kaj lia romano "Songô en la
Ruĝa Buduaro"

37 Ĉinio ĉe prunto-redona kulmino

48 Pentristaro de Guizhou strebanta al lokaj
gustoj

52 SCENEJO KAJ EKRANO:

Sekvu la "Spurojn de Amo"

6 En la Arkta Vilaĝo

30 AMUZOJ:

Ĉina ŝako (IV)
Amuzajetoj

17 FAGETOJ DE LA ĈINA SOCIO:

Telefono "Intima Fratino"

43 MI KAJ ĈINIO:

Bela rememoro

19 Lernantoj de postlaboraj

universitatoj

45 ESP-NOVAĴOJ

44 POR KOMENCANTOJ:

Kapablo
"Mi volas vian fingron"

42 Pri la ĉina Esperanto-turisma simpozio

14 SUR NIA LIBROBRETO:

Legu libron "Antikvaj Filozofoj de Ĉinio"

27 POEMO • KALIGRAFAĴO • PENTRAĴO:

Pri la poemo "Okcidenta mont-rojo de
Chuzhou"

4 INTERNI

44 KORESPONDI DEZIRAS

12 KURANTAJ AFEROJ

46 Triciklo en Pekino

4 Danco sur stilzoj Foto de HAN WUPING

2 Luoxi-pontego de Panyu-gubernio en la
Delto de Perlo-rivero Foto de HE HONGWEI

SUR LA KOVRILO:

Nupto de LIU SIGONG


SUR LA DORSKOVRILO:
[FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]Montoj de Tabrizo de Irano en malvarma
vintro de SAHROH FARZAD (Irano)

En milito inter Irano kaj Irako

de SAHROH FARZAD (Irano)

**LOKOJ
MENCIITAJ
EN ĈI TIU
NUMERO**

1. Humen
2. Mohe
3. Guizhou-provinco
4. Jishishan-a Baŭ'an-,
Dongŝjang- kaj
Salar-nacia Aŭtonoma
Gubernio
5. Minhe-a Huj- kaj Tu-nacia
Aŭtonoma Gubernio



En la Arkta Vilaĝo

Teksto de ZHANG MEIZHI


Fotoj de LIU SIGONG




La Arkta Vilaĝo en malproksimo

Sledoj sur neĝo





Vesperiĝo



Ĉambro kiel en printempo





Rompo de glacio por kapti fiŝojn

VINTRE Heilong-rivero glaciĝis kaj vilaĝo apud ĝi kovriĝis de neĝo. La blankaj vojoj, blankaj tegmentoj, blankaj arbobranĉoj... ĉio kvieta, kvazaŭ fiksita de dika tavolo da neĝo. Nur fumo el la kamentoj de ĉiuj domoj sciĝis al mi, ke tie estas vilaĝo kun pli ol 400 familioj. Ĝi estas Mohezhen (Moheĝen), la plej norda vilaĝo de Ĉinio, nomata ankaŭ "Arkta Vilaĝo".

La vilaĝo (122.21° E, 53.28° N.) alkroĉiĝas al la Granda Xing'an (Ŝing'an)-montaro unuflanke kaj al Heilong-rivero aliflanke. Trans la rivero estas Sovetunio. La aparta situo de la vilaĝo kreis ĝian apartan klimaton. La lokanoj diris, ke somero en la vilaĝo estas belega. Tiutempe vetero estas serena, floroj disvolviĝantaj, arboj verdaj kaj Heilong-rivero klara. Ĉiujare, ĉirkaŭ la 22-a de junio en la vilaĝo aperas sennoktaj tagoj. En la 22-a

horo oni povas ludi ŝakon sub la ĉielo kaj en la 24-a elkrepuskiĝas. En tiu sezono aperas norda lumo, tial miloj kaj dekmiloj da turistoj venas al la vilaĝo kaj pro tio ĝi famiĝis en- kaj eksterlande.

Vintro en la vilaĝo estas longa kaj frosta, kaj noktoj pli longaj. En la 8-a horo la suno leviĝas kaj en la 15-a malleviĝas. La lokanoj jam kutimiĝis al frosto, tial neniu el ili portas veston dikan kiel mi, veninta el Pekino. En la tago, kiam mi atingis la vilaĝon, la temperaturo estis 44°C sub la nulo. Frosta aero kiel akra tranĉilo pikis mian vizaĝon. Varma elspiraĵo baldaŭ solidiĝis kaj blankiĝis miajn harojn kaj brovojn. Mia kolego, fotografisto Liu Sigong, varmiĝis de longa marŝo kaj demetis la ĉapon. Post momento liaj oreloj frostiĝis. Tion rimarkinte, li tuj frotis la orelojn per neĝo, alie li perdus almenaŭ unu orelo.

Eble pro frosto, la Arkta Vilaĝo estis fermita en la historio. Laŭdire, en la lastaj jaroj de Ming-dinastio (1368-1644) la kortego starigis tie poŝtstacion kun nur kelkaj personoj. Poste oni malkovris tie orminejon, kaj orserĉistoj venis unu post alia. Oni transportis tien ĉiutagajn vivbezonaĵojn por liveri ilin al la orserĉistoj. Tiutempe al aliaj lokoj oni veturis sur Heilong-rivero per ŝipoj somere kaj sledoj vintre. Nur post la 70-aj jaroj la ŝoseo kaj fervojo estis finkonstruitaj unu post la alia.

Preskaŭ ĉiuj loĝantoj de la Arkta Vilaĝo venis el aliaj lokoj. Multaj el ili ne povis elteni malriĉan vivon kaj venis tien por orserĉado aŭ arbo-hakado. Kaj nun vintra arbo-hakado sur monto ankoraŭ estas ilia ĉefa rimedo por sin riĉigi. Frosta vintro estas ora sezono por la vilaĝanoj. Preskaŭ ĉiuj fortaj viroj iris al monto por labori.

Sur la monto estis neĝo profunda ĝis super la kruroj. Mi grimpis sur montodeklivon kaj fine vidis vilaĝanojn transportantajn lignon. Iliaj vizaĝoj ruĝiĝis de frosto kaj iliaj kapoj vaporis. Ili kriante "ho ruk" portis lignon de sur sledo. Vidinte min, raportistinon el Pekino, ili afable invitis min en sian barakon tegitan per kotono. En la mezo de la barako staris bone hejtata forno, ke la barako estis varma. La honestaj kaj iom krudaj junuloj ekmanĝis kun rido. La tiea arbaro apartenas al Mohe-forstejo de la Forsta Regiono de la Granda Xiang'an-montaro. En ĉiu vintro la forstejo devas dungii laborulojn por transporti de sur la monto lignon dehakitan de la forstistoj. Maljunulo Liu diris al mi: "Ni kutimas labori vintre sur la monto. Sur la monto la aero estas freŝa kaj tereno vasta. Se kelkajn tagojn ni ne estas sur la monto, ni sentas sufokon. Kaj krome, ni intencas perlabori pli da mono vintre." Li aĝas 65 jarojn. Kvankam li ne povis porti lignon, tamen li venis por hejti la barakon, manĝigi la ĉevalojn kaj sonorigi noktan sonorilon por anonci horon por la junuloj.

Viroj forlasas la vilaĝon ĉiufoje por kelkaj monatoj, dum virinoj prizorgas infanojn, preparas manĝon, bredas kokojn kaj porkojn, kudras vestojn kaj eĉ kaptas fiŝojn. Kvankam vintre estas malvarme en la vilaĝo, tamen kiam mi eniris en la hejmon de maljunulino Feng, mi tuj sentis varmon. Plejparto de la domoj de la vilaĝo estas konstruita el ligno tegita per tero ene kaj ekstere, kun pinta tegmento. Ankaŭ la domo de Feng estas tia. En kaj ekster la domo estas tre pure kaj eĉ la barilo farita el arboŝelo aspektas pli orda ol tiu de la najbaroj. Same kiel en alies kortoj, en ŝia korto amasiĝas brulligno. Ŝi diris al mi, ke preskaŭ ĉiuj familioj konsumas brullignon. Ĉu tiaj malnovaj domoj, ĉu novaj brikaj domoj, ĉiuj havas hejtatajn terliton kaj termuron. La terlito kaj termuro estas interligitaj kun kuirforno. Kiam oni kuiras, la terlito kaj termuro ricevas varmon. Se la klima-

to estas malvarmega, oni hejtas la terliton kaj termuron. Ĉiuj pordejoj kaj fenestroj estas duoblaj. Malgraŭ la malvarmo de la korto la domo ĉiam estas varma. Kaj floroj prosperas en ĉiuj familioj.

Neniu familio de la Arkta Vilaĝo posedas fridujon, sed ĉiuj familioj havas kutimon manĝi fridigitajn *ĝiaŭzi*-ojn (speco de farĉita farunaĵo). En vintro, precipe en festaj tagoj ili unufoje faras multe da *ĝiaŭzi*-oj kaj metas ilin en la korton por fridigi. En ajna tempo ili povas kuiri ilin. La manĝaĵo estas kaj oportuna kaj bongusta. La lokanoj ŝatas ankaŭ freŝajn legomojn. En ĉiuj kortoj troviĝas profundaj legomkeloj kaj en ĉiuj domoj malgrandaj keloj por freŝaj legomoj. Krome, la lokanoj havas ankaŭ alian metodon por konservi legomojn, t.e. acidigi brasikon. En vintro ĉiuj familioj acidigas brasikon en almenaŭ unu aŭ du vazoj. En frosta vintro ili tranĉas acidigitan brasikon en maldikajn striojn kaj aldonas faboamelajn vermiĉelojn kaj viandpecojn por kuiri ilin kune. La plado preparita el ili estas varma, iom acida kaj tre bongusta.

Poste mi sciis, ke Feng estis Shandong-ano. Kiam ŝi estis 19-jara, ŝi venis tien kun sia edzo kaj loĝis tie jam pli ol 40 jarojn. Nun ŝiaj nepoj vizitas lernejon. Ankaŭ s-ino Liu Xia (Liŭ Ŝja) loĝanta ĉe la plej norda fino de la vilaĝo estis Shandong-ano. Kiam mi atingis ŝian hejmon, la juna patrino estis plektanta lanveston por sia filo. Ŝia domo estas vasta. En la kuirĉambro troviĝas akvopumpilo. Ŝi diris, ke ĉiu familio havas akvopumpilon. En vintro ĝi ne ĉesas funkcii pro frosto kaj estas oportuna. En ŝia kuirĉambro mi rimarkis paton destinitan por fari patkukon. Kun rido ŝi diris al mi, ke la pato estis kunportita el la hejmloko kaj la familio povas ĝui patkukon en kiu ajn tempo.

Noktiĝis, sur la strato ne estis lampo, nek vojirantoj. Nur steloj trembrilis sur la ĉielo. La ĉefa amuzo de la vilaĝanoj estas televi-



Arbohakistoj

do. Oni diris, ke antaŭe en la vilaĝo ne troviĝis televidilo. Vespere oni faris nenion kaj frue ekdormis. En 1985 oni starigis en la vilaĝo televid-transsendan stacion kaj en 1987 ricevan stacion, ke la vilaĝanoj povas ĝui programerojn el Pekino. Nun televidilo jam fariĝis nemalhavebla por ĉiuj familioj.


Frosta vintro alportas senliman ĝojon al la infanoj de la Arkta Vilaĝo. Sur la neĝa tero en la vilaĝo kaj ĉe la rivero oni ofte vidas tiujn infanojn, kiuj ne timas froston. Ili kuras sur neĝo kun hundo kaj sledo. Ili ne portas ĉapon nek palton kaj iliaj manoj kaj vizaĝoj estas ruĝaj. Iuj el ili en memfari-taj simplaj glitŝuoj flugas sur neĝa vojo. Aliaj ruliĝas de sur alta riververdigado, malordigante la ebenan neĝan teron, kaj iliaj korpoj kaj vizaĝoj ricevas neĝon, tamen ili plezure ridas. Ilia naiva ridado longe ŝvebas super la kvietaj glacia ebenaĵo, super la Arkta Vilaĝo. ■



Aüreolo



En arbohakejo



Infanoj de la vilaĝo

Loĝejo de vilaĝanoj



● Ĉar post subpremado de la tumulto kaj kontraŭrevolucia ribelo en Pekino stabiligis la situacio de Pekino kaj la tuta lando, renormaligis la socia ordo kaj bone plenumigis la tasko praktiki la militan leĝon en iuj lokoj de Pekino, la Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio decidis, laŭ la 16-a ero de la 89-a artikolo de la Konstitucio de la Ĉina Popola Respubliko, aboli la militan leĝon en la 11-a de januaro 1990.

● Laŭ statistiko de la Ĉina Administracio de Ŝtata Havaĵo, nun en Ĉinio la totala valoro de la ŝtata havaĵo akirita post la ŝtata investado estas 1 615 miliardoj da juanoj.

● Laŭ statistiko de la ŝtata medikamenta administracio, la totala produktovaloro de la ĉina medikamenta industrio en 1989 estis 22.6 miliardoj da juanoj, je 4.4% pli multe ol en 1988. Multe bridigis la tro rapida kresko de la medikamenta industrio kompare kun la pasintaj jaroj. La medikamenta industrio stabile kreskas, venkinte la mankojn de materialoj, energio kaj kapitalo. De la pasinta jaro la medikamenta merkato estas stabila, la kuraciloj stabile vendiĝas, iom reduktiĝas la vendo de debitaj toni-



Membroj de la Gimnastika Delegacio de Taibei, Ĉinio, en la Pekina Flughaveno

kaj medikamentoj kaj la konflikto inter livero kaj bezono mildiĝas tagon post tago.


● Antaŭ nelonge oni publikigis la rezulton de la unua elektado de 10 eminentaj revenintaj transmarraj ĉinoj. La elektitoj en malsamaj postenoj faris elstarajn kontribuojn por la patrio en la nova periodo. Ekz. prof. Pu Zhelong el Usono dum longa tempo sin dediĉis al esplorado de mortigo de fiinsektoj per insektoj kaj elhakis vo-


jon por preventi kaj kuraci plantmalsanojn kaj batali kontraŭ fiinsektoj. Kiel ĉeftrejnistoj de la Ĉina Vira Volana Teamo, Hou Jiachang el Indonezio, senĉese elkulturas eminentajn sportistojn, ke la teamo trifoje gajnis la mondan teaman ĉampionecon kaj naŭfoje la mondan ĉampionecon de solludo.

● La triaperioda konstruo de karbokajo de Qinhuangdao-haveno, la plej granda energi-eksporta haveno de la mondo, estis ekzamenita de la ŝtato kaj lanĉita en la fino de 1989. La kompletiga konstruado de elektrizita fervojo speciale por transporti karbon de Datong al Qinhuangdao komenciĝis en aprilo 1984, kun totala investo de 650 milionoj da juanoj. Estis konstruitaj du ankrejoj por 35 000-tonela ŝipo kaj unu ankrejo por 50 000-tonela ŝipo, kun jara akceptopovo de 30 milionoj da tunoj. Ili estas destinitaj por suden transporti karbon de Shanxi, Interna Mongolio kaj aliaj lokoj, kaj plenumi la eksportan taskon.

● Konstruantoj de Tianjin konstruas trefkruciĝon por Bankoko, Tajlando. Kun longeco de 5 400 m kaj areo de 60 000 kvadrataj metroj ĝi estas nodo de fervojo, rivero

La triaperioda konstruo de karbokajo de Qinhuangdao-haveno





Artefaritaj stel-gemoj

kaj aŭtovojo, kiu kondukas al la flughaveno de Bankoko.

- Post kvinjara surloka esplorado ĉinaj sciencaj esploristoj konstatis, ke okcidenta Pacifiko pro intensa sunradiado sorbas multe da varmo kaj estas la plej granda "varm-akva rezervejo" en la mondo. Pro koincido de atmosfero kaj multaj aliaj faktoroj okcidenta Pacifiko estas fonto de tajfuno kaj influas rekte la klimaton de la tergloblo.

- Ĝis nun Ĉinio kontaktiĝis kun pli ol 50 landoj, kiaj Usono, Britio, Francio, Japanio kaj FR Germanio, por medi-protektado, kaj subskribis kun iuj landoj kunlaborajn interkonsentojn. Ili faris interŝanĝojn en multaj flankoj, kiel interŝanĝo de fakuloj kaj teknikoj por forigi polucion de atmosfero kaj akvo kaj tiun kaŭzitan de forĵetaĵoj, bruo kaj radiado, kaj interŝanĝo por medi-protekta edukado kaj medi-kontrolo.

- La redakcio de la ĵurnalo "Ĉina Sporto" kaj aliaj organizoj elektis dek gravajn ĉinajn sportajn novaĵojn, inkluzive tiujn pri pezgloboĵetistino Huang Zhihong, ĵu-distino Gao Fenglian, sportistino pri rapida sketado sur mallonga kurejo Guo Hongru kaj iuj gеспортistoj pri halterlevo, gimnastiko kaj

plonĝo, kiuj ĉiuj gajnis orajn medalojn en internaciaj konkursoj, la glata prepara laboro de la 11-a Azia Sportkunveno, 34 membroj de la konsilantaro de la Azia Olimpika Komitato, kiuj akceptis invitilojn por la konkurso, 80 eminentaj trejnistoj kaj sportistoj, kiuj faris elstarajn kontribuojn por la ĉina sporta afero en la pasintaj 40 jaroj, nombro da teamoj el Taiwan-provinco venintaj sinsekve al la kontinento por partopreni konkursojn, kaj sporta interŝanĝo inter ambaŭ bordoj de la markolo.

- La ĉefa parto de la 63-etaĝa Guangdong-a Internacia Domego en Kantono estis tegmentita antaŭ nelonge. Ĝi, 200.18 m alta, okupas la 15-an lokon en la mondo inter la nunaj ferbetonaj konstruaĵoj.

- La unua ĉina panorama halo estas konstruita en la urbo Jinzhou, Liaoning-provinco, memore al la Ĉina Popola Liberiga Armeo, kiu konkeris la urbon en 1948. La panoramo "Konkero de Jinzhou" havas perimetron de 112.24 m kaj alton de 16.1 m. Kiam oni staras sur la panorama videjo, prezentiĝas antaŭ la okuloj artisme aranĝita planko de 1 000 kvadrataj metroj kunfandiĝinta kun la bildo. En akompano de speciala lumo kaj stereofonia akustiko, oni sentas sin kvazaŭ en la tiutempa medio.

- En la komenco de la 80-aj jaroj Ĉinio komencis esplori artan stel-gemon kaj solvis la problemojn makuli ĝin kaj difini la direkton de vejnoj. Ekz. post la apero de la arta stel-gemo en Ŝanhajo multaj ekspertizistoj ne kuraĝis aĉeti naturajn stel-gemojn senpripense.

- Dum la 40 jaroj de kiam la Changchun-a Studio de nordorienta Ĉinio dublis la unuan filmon "Ordinara Soldato" en majo 1949, ĝi kaj la Ŝanhaja Filmdublejo dublis pli ol 1 500 rakontajn filmojn de 48 landoj.

- Post tri jaroj de kiam oni eltrovis la sensacian Diinan Templon en la 5 000-jara ruino de Hongshan-kulturo en okcidenta Liaoning-provinco, oni malkovris grandegan maŭzoleon de ĉefoj de la primitiva socio kovrantan areon de ĉ. 10 000 kvadrataj metroj. Post surloka esplorado fakuloj el Usono, Francio, Japanio kaj Hindio opiniis, ke la ruino estas mondskala malkovro komparebla kun iuj mondfamaj antikvaj kulturoj.

- Kompletio da porcelanaĵoj estas farita en la ĉina porcelana urbo Jingdezhen, imite al tiuj por la edziĝa ceremonio en imperiestra familio de Qing-dinastio (1644-1911). Oni dismetis la kompletan en spaco de 12 kvadrataj metroj. Post ekspertizo fakuloj opiniis, ke la porcelanaĵoj post bakado, farbado kaj ornamado estas apenaŭ distingeblaj de la originalo.

- Lastatempe ĉinaj arkeologoj trovis en antikva tombejo kunentombigitajn homojn antaŭ 5 000 jaroj en Xinyi-gubernio de Jiangsu-provinco. Inter la 40 pri-fositaj tomboj troviĝas 5 grandaj tomboj, ĉiu kun longeco de 5 m kaj larĝeco de 3 m. La entombigitoj estis viroj, ĉe kies piedoj aŭ brakoj estis po 1-2 kunentombigitaj geknaboj. Antropologoj de la Ŝanhaja Natursciencia Muzeo ekspertizis kaj diris, ke tio estas la plej frua tombejo kun homoj kiel kunentombiĝaĵo ĝis nun trovita en Ĉinio. Ĝi estas tre valora por esplori la originon de la sklava sistemo.

Legu libron “Antikvaj Filozofoj de Ĉinio”

de LIU CAISHENG

ANTIKAJ FILOZOFOJ DE ĈINIO verkita de Hoŭ Ĝjueljang, eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo. Formato: 18×12 cm. 224 p. Prezo: 4 usonaj dolaroj.

Hoŭ Ĝjueljang, laboranto de la redakcio de “El Popola Ĉinio”, amas literaturon jam de la infaneco kaj bone konas ankaŭ filozofion kaj precipe la antikvan filozofion de Ĉinio. La tradukintoj de la libro estas veteranaj esperantistoj de Radio Pekino kaj “El Popola Ĉinio”.

En la libro “Antikvaj Filozofoj de Ĉinio” la aŭtoro uzis la unuan personon kaj rakontante konigas la travivaĵojn de 31 ĉinaj filozofoj, inkl. de Konfuzio kaj Ŭang Fuĝi, ilian malglatan vivvojon, iliajn ideologiojn kaj moralon, kaj anekdotojn kaj legendojn pri ili. La libro konigas Konfuzion, fondinton de konfuzianismo, Menzion kaj Dong Ĝongŝu, majstrojn pri konfuzianismaj klasikajoj, kaj aliajn, kiuj ludis gravan rolon en la historio de Ĉinio kaj en tiu de la Oriento kaj dum longa tempo tenis regantan pozicion en la ĉina akademia historio. La libro konigas Laŭzion kaj Ĝuangzion, fondinton kaj daŭriganton de la taoisma skolo, kiuj donis profundan influon al la ĉina historio. La libro konigas ankaŭ Sunzion, Han Fej, Ŭang Ĉong, Liŭ Juŝji, Ŭang Fuĝi kaj aliajn materiismajn pensulojn, kiuj faris elstarajn kontribuojn al la disvolviĝo de la ĉina historio. Iuj el ili estis ne nur filozofoj, sed ankaŭ politikistoj, militaj strategiistoj, edukistoj, poetoj aŭ literaturistoj.

En la ĉapitro “Konfuzio, fondinto de konfuzianismo” la aŭtoro prezentis la devenon de Konfuzio, lian oficistan vivon, edukan karieron, vojaĝon al diversaj regnoj kaj lian ordigon de Ŝiĝing (Poezia Libro) kaj verkadon de “Printempo kaj Aŭtuno”. La aŭtoro turnis grandan atenton al konigo de la kerno de la konfuzia penso — filantropo kaj la ora mezo, principo profundinflua en la historio de Ĉinio.

En “Ŝjunzio, kiu epitomigis la pensojn de diversaj skoloj” la aŭtoro konigas la materiisman vidpunkton “unuigi scion kaj agon”, t.e. “scio” estas submetita al la kontrolado de “ago”. Ŝjunzio klare montris, ke oni



“devas distingi homojn per la principo unuigi la scion kaj agon”. “Kiu kapablas kaj paroli kaj agi, tiu estas “ŝtata trezoro; kiu kapablas ne paroli sed agi, tiu estas ŝtata talentulo; kiu kapablas paroli sed ne agi, tiu estas ŝtata utilulo; kiu bele parolas sed fiagas, tiu estas ŝtata monstro! Reganto de la ŝtato devas respekti la trezoron, ami talentulon, enoficigi utilulon kaj elimini monstron.” Lia trafa opinio estas utila eĉ hodiaŭ.

La periodoj de Printempo kaj Aŭtuno kaj Militantaj Regnoj estas tempo, kiam la ĉina historio transiris de la sklava socio al la feŭda. En tiu periodo naskiĝis multaj grandaj personoj. El la 31 filozofoj priskribitaj en la libro 10 naskiĝis en tiu periodo. Fama milita strategiisto Sunzio ja estas unu el ili. Jam antaŭ 2 200 jaroj Sunzio faris dialektik-materiisman tezon “kiu konas kaj sin kaj la malamikon, tiu estas nevenkebla”, “oni ataku, kiam la malamiko ne estas preparita”, “eviti la fortan flankon de la malamiko kaj kapti ties feblan punkton.” Sunzio asertis, ke “en difinitaj kondiĉoj la du flankoj de kontraŭdiro povas transiĝi unu al la alia. Vero kaj falso, multo kaj malmulto, forteco kaj malforte, laboro kaj ripozo, ordo kaj malordo, kuraĝo kaj malkuraĝo, ofensivo kaj defensivo, marŝo kaj retreto, vivo kaj morto, surprizatako kaj vid-al-vida atako kaj tiel plu, ne estas senŝanĝaj, ili povas ŝanĝi laŭ variado de kondiĉoj.”

El tiu ĉi libro oni akiros ĝeneralajn sciojn pri la antikva ĉina historio de pensado kaj konos eminentajn historiajn personojn, la spiriton kaj tradicion de la ĉina nacio. Per literatura lingvo la aŭtoro evitigis la libron de seka parolo ofte vidata en filozofiaj lernolibroj.

La tradukaĵo estas facile komprenebla. Ĝi konservas la lingvan stilon de la originalo. Tamen iuj frazoj en la libro estas pleonasmaj. Sur p. 5 kaj 6 legiĝas tia terure longa frazo: “Tio manifestiĝis tiel,

ke... nenia religia forto okupis pozicion en Ĉinio." Ĝi okupas 27 liniojn.

En la libro troviĝas ankaŭ iuj frazoj tro katenitaj de la ĉina esprimmaniero. Sur p. 8 ni legas jenan frazon: "Postiĝis Ĉinio, postiĝis ĝiaj sciencoj kaj teknikoj, postiĝis ĝia ekonomio, postiĝis ĝia politika sistemo, postiĝis ĝiaj sociologiaj teorioj." En ĝi la vorto "postiĝis" aperis 5-foje. Ĉu tio ne estas tro teda?

Krome, en la versio estas ankaŭ iuj eraroj, ekz. sur p. 2 estas frazo "... ĉio en la mondo konsistas el la kvin materiaj elementoj akvo, fajro, ligno, oro kaj tero." En la frazo la vorto "oro" estas erara, ĝi devas esti "metalo".

Tamen juĝate laŭ la ĝeneralaj trajtoj, "Antikvaj Filozofoj de Ĉinio" estas bona libro, tre leginda, precipe en Esperantujo ĝi estas leginda kaj nemalhavebla. ■

Ĉinio Helpas Siajn Malriĉajn Kamparanojn

de LI QIANG

KVANKAM Ĉinio akiris rimarkindan sukceson en ekonomia konstruado en la pasintaj 40 jaroj, tamen ĝi ankoraŭ havas malriĉajn regionojn kaj nemalmultajn malriĉajn kamparanojn, al kiuj mankas sufiĉa vivteno. Ĉi-sube estas statistiko farita de la Ĉina Ministerio pri Civilaj Aferoj: En 1985, el 1919 gubernioj de Ĉinio 331, inkl. de 141 en la regionoj de nacimalplimulto, estis malriĉaj kaj helpataj de la ŝtato, interalie estis 181 gubernioj, inkl. de 90 en la regionoj de nacimalplimulto, kies pokapa jarenspezo ne superis 200 juanojn, kaj inter ili estis 83 plej malriĉaj gubernioj, kies pokapa jarenspezo eĉ ne atingis 150 juanojn. El pli ol 90 milionoj da malriĉaj loĝantoj, al kiuj mankis sufiĉa vivteno, 21.4 milionoj estis nacimalplimultanoj.

Tio estas kompleksa historia problemo. Kiam fondiĝis la nova Ĉinio, ĝi alfrontis ĉie malfacilaĵojn kaj la ĉina popolo vivis en mizero. Dank' al la gvidado de la ĉina registaro kaj multjara peniga luktado de la ĉina popolo, jaron post jaro disvolviĝis produktado kaj la vivo de la plejparto da ĉinoj pliboniĝis paŝon post paŝo. Precipe de post la fino de la 70-aj jaroj, plue disvolviĝis la ĉina ekonomio, direktate de la politiko pri reformo kaj pordomalfermo. En 1984, la Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio publikigis la "Sciigon pri helpo al la malriĉaj regionoj por kiel eble plej rapide ŝanĝi ilian fizionomion". Post kelke da jaroj, dank' al la helpo de la ŝtato, evoluintaj regionoj kaj ĉiuj rondoj de la socio, la ekonomio de ĉiuj malriĉaj regionoj disvolviĝis en malsamaj gradoj. Precipe en iuj historie malriĉaj regionoj en orienta kaj centra Ĉinio, ekz., la montregionoj Yimeng, Dabie, Taihang kaj Minyue, estas fundamente solvita la problemo pri vivteno. Laŭ statistiko, en 1988, en pli ol duono de la malriĉaj gubernioj de la tuta lando, la

pokapa jarenspezo superis 300 juanojn. Restis 51 malriĉaj gubernioj, inkl. de 38 en la regionoj de nacimalplimulto, kies pokapa jarenspezo ne atingis 200 juanojn, kaj 8 plej malriĉaj gubernioj, kies pokapa jarenspezo ne atingis 150 juanojn. La nombro de la loĝantoj, kies pokapa jarenspezo ne atingis 200 juanojn, estis 30 milionoj, inter kiuj pli ol 15 milionoj estis nacimalplimultanoj.

En la aŭtuno de 1989, en Pekino okazis la "Laborkunveno pri helpo al la malriĉaj regionoj de nacimalplimulto en la tuta lando". La ĉina registaro ellaboris multajn specialajn politikojn favore al la regionoj de nacimalplimulto, por kiel eble plej rapide solvi la problemon pri vivteno de la tieaj kamparanoj.

Dong-o en sunumado de greno





Nova domo de kamparanoj

La okcidenta Ĉinio estas kompare malriĉa. Unu el la ĉefaj kaŭzoj estas malbona natura medio. Oftiĝas naturaj katastrofoj, kiaj troa frosto, dezertiĝo, teralkaliĝo, kot-ŝtona fluo, tertremo, sablovento, inundo kaj hajlo. Rezulte de tio, malboniĝas la viv- kaj produkt-kondiĉoj, eĉ perdiĝas fundamentaj vivkondiĉoj en kelkaj lokoj. La neegala disvolviĝo de la socio kaŭzas la malaltan nivelon de produktado. En iuj landlimaj montregionoj, la nacimalplimultoj ankoraŭ konservas la postiĝintan primitivan kultivadon per tranĉilo kaj fajro kaj malriĉe rikoltas sur vasta kampo. Ili vivas de la naturo. En iuj lokoj oni sin vivtenas per batatoj, terpomoj, maizo k.a. Pli malfacila estas la vivo de kamparanaj familioj, kiuj posedas ne sufiĉe da laborfortoj aŭ havas malsanulojn. En tiuj lokoj regas maloportuna trafiko, malfacile akireblas informoj kaj ne prosperas var-ekonomio. Kaj tiom pli, tro rapida kresko de loĝantoj, nebonaj sanprotektaj kondiĉoj, cirkulado de endemio kaj infektaj malsanoj. Ĉio ĉi kaŭzas malstabilecon de la vivo, kaj la lokanoj longtempe vivas mizere. Kvankam nemultaj estas la tieaj loĝantoj, tamen estas tre malfacile solvi la problemon pri vivteno.

Antaŭe, la ĉina registaro helpis la malriĉajn regionojn nur per donado de greno, mono, vesto kaj aliaj vivbezonaĵoj, sed tio ne povis liberigi la lokanojn radikale el mizero. De la lastaj jaroj la registaro anstataŭe helpas al ili disvolvi ekonomion por riĉigi la kamparanojn per ties laboro. Tiuj regionoj estas vastaj kaj abundaj je riĉfontoj, kio donas bonajn kondiĉojn al ekonomia disvolviĝo.

Kompreneble, estas diferencaj unu de alia la malriĉaj regionoj, ankaŭ estas malsamaj la metodoj ilin riĉigi. En Longnan-regiono de Gansu-provinco kaj en la paŝta regiono sur la stepo de la Interna Mongolio, oni plene energie disvolvas plant-kulturadon kaj bruto-bredadon, utiligante favorajn naturajn kondiĉojn. Tie ĉiu homo devas kulturi ĉ. 1 muon (1 muo = 1/15 hektaro) da kampo kun konstante alta produktokvanto. Ĉiu familio devas kulturi 1 muon da frukto-arboj, ĉiujare ĝi devas vendi al la ŝtato 1 bovon. Laŭ specifo, ĝi povas partoprenigi 1 laboru-

lon en neagrikultura produktado. Post praktiko en kelkaj jaroj kaj dank' al helpo de la ŝtato, parto da malriĉaj familioj starigis familian ekonomian strukturon kun agrikulturo, forstumado, paŝtado kaj flankokupo kiel unu tuto, kio plivastigis enspezan devenon kaj plirapidigis ekonomian disvolviĝon.

Samtempe kun tio, en iuj regionoj, utiligante sian superecon, oni disvolvas malgrandajn industriojn, kiuj ne konkuras pri krudmaterialoj kaj energioj kun ŝtataj entreprenoj. La Minhe-a Huj- kaj Tunnacia Aŭtonoma Gubernio en Qinghai-provinco ekspluatas mineralojn kaj funkciigas pli ol 10 ferosilikajn fabrikojn, tiel ke estas kontentigita la bezono de la ŝtata industrio kaj multigita la enspezo de granda nombro da malriĉaj familioj. En la Jishishan(Ĝjiŝiŝan)-a Baŭ'an-, Dongŝjang- kaj Salar-nacia Aŭtonoma Gubernio, Gansu-provinco, baŭ'an-oj lernigis la arton fari delikatan ĉetalian tranĉilon al aliaj nacimalplimultanoj kaj helpis ilin konstrui prilaborejojn, kio liberigis pli multajn homojn el malriĉeco. En la Ebian-a Ji-nacia Aŭtonoma Gubernio, Sichuan-provinco, interkruciĝas riveroj kaj estas tre abundaj akvaj riĉfontoj. Oni konstruis multajn hidroelektrajn staciojn, tiamaniere ili solvis la elektran malfacilon de la gubernio, liveris elektron al la ŝtato kaj plimultigis sian enspezon.

Farante tion, la ŝtato turnas grandan atenton sur la ekonomian kaj teknikan kunlaboron. Hebei-provinco faras laŭkontraktan kunlaboron inter agrikulturaj scienc-teknikaj grupoj, kun administra instanco, teknika departemento, scienc-esplora fako, kolegio kaj materialo-livera departemento kiel unu tuto kaj plenenergie popularigas agrikulturajn teknikojn, kio ludas gravan rolon en la disvolvado de agrikultura produktado kaj solvado de la problemo pri vivteno. De 1982 la Dua Ĉina Aŭtofabriko en Hubei-provinco, utiligante sian ekonomian forton, helpis al malriĉaj kamparanoj de Yunyang-regiono konstrui 19 fabrikojn kaj liveris al ili siajn teknikojn kaj instalaĵojn. Iuj kamparanoj faras aŭtajn pecojn por ĝi. En 1988 la produktovaloro de la maŝina industrio de Yunyang-regiono atingis 162 milionojn da juanoj, 24-oble pli multe ol tiu en 1980, kaj riĉiĝis la lokaj malriĉaj kamparanoj.

La troa kresko de la loĝantaro superis ekonomian disvolviĝon, kio jam vekis atenton de la malriĉaj regionoj. La kresko de la loĝantoj en Guizhou-provinco ĉiam estas pli alta ol tiu meznombra de la tuta lando. Kvankam la provinco akiris riĉan rikolton en 1989, tamen ĝi ankoraŭ estis unu el la provincoj, kies pokapa grenkvanto estis la plej malalta en la tuta lando. La loĝantara kresko kaŭzis grandegan malfacilon al ia ekonomia disvolviĝo de Guizhou-provinco. Tial la provinco kombinas agrikulturan disvolviĝon, ekologian ekvilibron kaj limigon de loĝantara kresko. Estas espereble paŝon post paŝo solvi la problemon pri vivteno de la malriĉaj kamparanoj. ■

Telefono "Intima Fratino"

de CHEN BAOHE

"INTIMA fratino, mi tre timas verki artikolon. Kion fari?"

"Mi jam finis la hejmtaskon, sed la patro ne lasis min eliri por amuziĝo. Ĉu li estas prava?"

"Mi bone rilatas kun lernantino. Tamen instruisto diris, ke mi enamigis al ŝi kaj ĉiam kritikis min. Kiel mi faru?"

"Mi bredas katon, sed ĝi ne manĝas. Tio maltrankviligis min. Ĉu ĝi povas morti?"

Ĉiutage sinceraj kaj esperplenaj demandoj venas unu post alia de diversaj lokoj de Ĉinio per telefono al ordinara oficejo, numero 2, Haiyuncang, Orienta Distrikto, Pekino. Tie sidas la redakcioj de "Ĉina Geknaba Gazeto" kaj "Ĉina Infana Gazeto". Ĉiam, kiam telefono sonas, juna sinjorino prenas la aŭdilon kaj atente aŭskultas voĉojn el diversaj lokoj. Sur la muro apud ŝi estas gluitaj okulfrapaj ideografiaĵoj "Intima Fratino".

La telefono "Intima Fratino" estis instalita de la nomitaj redakcioj en marto 1988. Ĝi estas ununura servo al pli ol 100 milionoj da ĉinaj geknaboj kaj infanoj per telefono. Kvankam en multaj lokoj de Ĉinio nun ankoraŭ ne estas telefono, ke multaj geknaboj kaj infanoj ne povas ĝui la servon, tamen en iuj regionoj, precipe en grandaj urboj, kie progresas telekomunikado, la telefono "Intima Fratino" ĝuas prestiĝon inter geknaboj kaj infanoj kaj en la socio pro sia fruktodona laboro.



Intimaj fratinoj

Ĝuste kiam mi kun granda intereso atingis la oficejon, kiu allogas multajn geknabojn kaj infanojn, por koni kiel laboras "Intima Fratino", mi aŭdis la jenon:

"Jin Yuewen, estu kvieta, ordigu la rompitan vitro-tableton kaj purigu la plankon," juna sinjorino milde kaj trankvilige parolis per telefono. "Poste kviete atendu la gepatrojn de via kunlernanto. Post kiam ili revenos, rakontu al ili, kiel vi rompis la tableton, kaj serioze konfesu vian kulpon. Samtempe montru al ili vian sincerecon, ke vi klarigos la aferon al viaj gepatroj kaj ili kovros la difekton... Ĉu vi bone aŭdis?... Mi atendos vian respondon morgaŭ por informiĝi pri la traktado kaj iom helpi vin refoje..."

Post kiam la sinjorino fintelegis, mi diris al ŝi mian intencon. En la interparolado mi sciis, ke ŝia nomo estas Wu Ruomei kaj ŝi es-

tas unu el la kvar intimaj "fratinoj". Ŝi laboras tie ekde la funkciigo de la telefono "Intima Fratino". Ŝia ĉefa tasko estas konsultiĝi per telefono. La aliaj traktas rilatajn aferojn. Poste ŝi rakontis al mi pri la instalo de la telefono kaj sia laboro.

Jam antaŭlonge "Ĉina Geknaba Gazeto" kaj "Ĉina Infana Gazeto" malfermis la rubrikon "Intima Fratino" por respondi leterojn de element- kaj mezlernejoj kaj klarigi demandojn faritajn de ili. Tamen kun la disvolviĝo de la socia reformado en Ĉinio en la lastaj jaroj, laborantoj de la redakcioj sentis bezonon pri taŭga kanalo por tuj kontaktiĝi kun la legantoj, koni iliajn pensojn kaj petojn, aŭskulti iliajn opiniojn pri la gazetoj kaj helpi ilin solvi siajn urgajn problemojn. Tiel venis al ili ideo instali la telefonon "Intima Fratino". La 2-an de marto 1988 ekfunkciis la telefono. Kaj



Intima fratino Wu Ruomei subskribas por infanoj.

anticipe la ĉefaj ĵurnaloj de Ĉinio publikigis ĝian telefonnumeron 440779.

Wu Ruomei diris al mi, ke la funkciigo de la telefono tuj vekis vastan atenton kaj ricevis laŭdon de geknaboj kaj diversaj tavoloj de la socio. Ĝis nun ili ricevis 12 000 telefonajn alvokojn kaj preskaŭ 3 000 leterojn. La enhavo de la telefonado tuŝis diversajn flankojn de la lernado kaj vivo de element- kaj mezlernejoj. Multaj lernantoj rigardas "Intiman Fratino" kiel sian plej fidindan amikon. Per telefono ili elverŝas al ŝi siajn ĉagrenon kaj "sekreton", kiujn ili ne volas diri eĉ al siaj gepatroj kaj amikoj, kaj petas ŝian kredeblan helpon en sia plej malfavora situacio.

Iutage Xiao lin, mezlernejo de Pekino, subite telefonis al "Intima Fratino", ke li estas preta forlasi sian apatian familion. Tion aŭskultinte, Wu Ruomei ekkomprenis, ke la knabo senelira sincere petas ŝian helpon. Ŝi do per

tre mildaj vortoj kvietigis lin, ke li klare eldiris la tutan aferon.

Xiao Lin estas lernanto de la tria klaso de malsupera mezlernejo. Du monatojn post lia naskiĝo liaj gepatroj eksedziĝis. Post la reedziĝo de la patro li fariĝis superflua en la familio kaj ne ricevis zorgon kaj amon, kiujn devas ricevi samaĝaj infanoj. Li diris al Wu Ruomei: "Ĝis nun dum mia vivo neniu akompanis min amuziĝi en iu ajn loko." "Do, mi akompanos vin..." diris Wu Ruomei. En la sekva dimanĉo ŝi lasis sian infanon hejme, akompanis Xiao Lin viziti Xiangshan-parkon kaj, krome, fotografis lin. En sekvaj semajnoj ŝi tri-foje akompanis lin en feriaj tagoj por rebruligi fajron de espero en lia vundita koro. En lia festo en 1989 ŝi akompanis lin viziti amuzejon kaj donacis al li girlandon. Nun li fariĝis ŝia intima amiketo.

Se alilokaj lernantoj volas telefoni al "Intima Fratino", ili devas sin turni al longdistanca telefonio. Tio kaŭzis al ili malfacilon. Tamen, kiam ili bezonas helpon, ili povas telefoni al Pekino. Iutage, apenaŭ Wu Ruomei prenis la aŭdilon, ŝi aŭdis ploradon de knabino. Ŝi diris al Wu Ruomei: "Mi nomiĝas Yanni kaj lernas en elementa lernejo de la urbo Wuhan. Mia patrino estas malsana je kancero kaj baldaŭ forlasos min. Mi tre timas, mi timas solecon." Wu Ruomei kuraĝigis la malfeliĉan knabino: "Vi devas vidigi al via patrino, ke vi estas kuraĝa kaj prudenta." Poste Wu Ruomei publikigis sian interparolon kun Yanni por alvoki, ke geknaboj de la tuta lando amikiĝu kun ŝi per korespondo kaj helpu ŝin forigi la malfeliĉon. Poste en sia letero al "Intima Fratino" Yanni skribis, ke en dekelkaj tagoj ŝi ricevis leterojn de centoj da kamaradetoj, kiuj volas amikiĝi kun ŝi. Ŝi estis tre ĝoja kaj ŝia malsana patrino larmis de emocio.

Ĉar telekomunikado prosperas ne en ĉiuj lokoj de Ĉinio kaj estas

malfacile por iuj lernantoj telefoni al "Intima Fratino", laborantinoj de la redakcioj funkciigis mallongtempan telefonon "Intima Fratino" en pli ol 20 urboj de 8 provincoj dum du jaroj post la ekfunkciigo de la telefono "Intima Fratino".

Aprile de 1989 Wu Ruomei kaj alia intima "fratino" venis en Jiangxi-provincon. En ĝia ĉefurbo Nanchang kaj aliaj urboj Jingdezhen kaj Jiujiang ili funkciigis mallongtempan telefonon "Intima Fratino". En Jiujiang ili instalas la telefonon en la Geknaba Domo. Post la ekfunkciigo de la telefono, ili ne ripozis eĉ unu minuton. Telefonaj alvokoj venis unu post alia. Iuj lernantoj eĉ kuris al la Geknaba Domo pro la okupateco de la telefono. Sed kiam ili vidis, ke intima "fratino" ne havas tempon akcepti ilin, ili sin turnis al proksima telefono kaj vicatendis.

Kiam mi estis adiaŭanta la junan sinjorinon, ŝi elprenis keston da ruĝaj faboj kaj rakontis ĝian historion.

Foje ŝi funkciigis mallongtempan telefonon "Intima Fratino" en la urbo Nanning en suda Ĉinio. Plenuminte la taskon, ŝi sin preparis por reveni al Pekino. Nelonge post ekveturo de la trajno iu armeano transdonis al ŝi la keston kaj diris al ŝi, ke sur la kajo kelkaj knabinoj petis, ke li transdonu ĝin al ŝi. Wu Ruomei malfermis la keston kaj vidis 56 ruĝajn fabojn en ĝi. Ŝi komprenis, ke ruĝa fabo signifas sopiron. Sed kiu donacis al ŝi? Kiam ŝi estis en Nanning, ŝi telefone parolis kun centoj da lernantoj kaj akceptis tre multajn lernantojn. Ŝi ne sciis, kiu estas la donacinto. Post sia reveno al Pekino ŝi ricevis leteron, kiu informis, ke la ruĝaj faboj estas donacitaj de kvin lernantinoj de la 14-a Mezlernejo de Nanning. En la letero ili skribis: "Intima fratino, ĉu vi ricevis niajn ruĝajn fabojn? Ili montras nian sopiron al vi. Intima fratino, ni amas vin." ■

Lernantoj de postlaboraj universitatoj

Teksto de SUN GUOLIANG

Fotoj de WU XINHUA

PRO financaj malfaciloj kaj nesufiĉeco da instruistoj kaj instalaĵoj en la supera edukado de Ĉinio, la nombro de la elbakitaj personoj ne povas kontentigi la socian bezonon. Por ŝanĝi tiun staton kaj kontentigi la bezonon de la adultaj laborantoj por lernado, Ĉinio fondis poradoltajn postlaborajn universitatojn ekde la 50-aj jaroj. Post 1979, poradoltaj, radio-televidaj kaj aliaj postlaboraj universitatoj aperis kiel funkcioj post pluvo. Sole en Pekino funkcias 88 tiaj lernejoj, kiuj elkulturis 180 000 studentojn. Ĉi-sube mi konigos al vi kelkajn studentojn. Iuj el ili daŭrigas sian lernadon en universitato, aliaj jam finis sian studon kaj ricevis certajn atingojn en la laboro. Leginte la artikolon, vi povas koni la nunan

staton de la poradolta edukado en alta lernejo de Ĉinio.

ĜOJO EN LERNADO

La 48-jara Wang Qiuping lernis en poradolta universitato jam plurajn jarojn, tamen en la okuloj de ŝiaj kolegoj, ŝi iris la vojon en la lernado ne tiel glate kiel ŝiaj kamaradoj. Ĝis nun ŝi ankoraŭ ne akiris diplomon. Demandite pri la kaŭzo, ŝi ekridetis kaj rakontis al mi pri sia travivaĵo.

Ŝi laboris iam kiel analizistino kaj kontistino en fabriko kaj nun instruas en lernejo. En la fabriko ŝi diligente lernis koncernajn sciojn por dekelkaj jaroj. Tiam ŝi neniom pensis pri la diplomo. Ŝi diris, ke ŝi faris tion ĝuste por laboro kaj

sen lernado ŝi sentis kvazaŭ ion perdita.

En la 80-aj jaroj ŝi komencis lerni filozofion, politikan ekonomikon, logikon kaj aliajn branĉojn de la sociaj sciencoj. Ŝi diris, ke la edziniĝo kaj nasko multe malfaciligis ŝian lernadon. Ŝia edzo estas tre okupata de laboro. Por lernado ŝi devas loĝi en la lernejo kune kun siaj ĝemeloj. Kun larmoj en la okuloj ŝi diris al mi: "Mi ne estas bona patrino, nek bona edzino. Mi ne turnas grandan atenton al la lernado de miaj infanoj, nek zorgas pri mia edzo. Mia edzo ofte preparas manĝaĵojn kaj alportas ĝin al mi post tuttaga laboro. Mi legas preskaŭ dum la tuta postlabora tempo. Oni diris, ke mi estas tro egoisma, sed nun mi ne havas alian elturniĝon kaj kelkiam senkulpigas min konsiderinte, ke nur bone klerigita patrino povas bone eduki siajn infanojn kaj familio kun bone klerigita edzino povas esti enhavoriĉa. Mi deziras, ke tio pli frue realiĝu."

Nun Wang Qiuping lernas en la literatura kurso de la Poradolta Universitato sub la Pekina Laborista Sindikato. Ŝi diris: "Mi estimas sinjorinon Kuri. Kvankam mi ne povas atingi tiajn brilajn sukcesojn, kiajn ŝi rikoltis, tamen mi povas lerni de ŝi diligentecon kaj penemon en lernado. Por adultoj lernado estas ĝuo kaj hardado de la volo."

Sendube, Wang ne estas sola studentino en la universitato. Mi renkontis tie aliajn du studentojn. Unu estas 46-jara Xi Xiulan. Xi diris al mi: "Tio estas la lasta ŝanco

Hao Tuo (apud lambastonoj) en leciono



por mi en la lernado. Miaj edzo kajamikinoj ne konsentas kun mi pri la lernado, dirante, ke mi estas malsaĝa, sed mi opinias, ke tiu estas vera malsaĝulo, kiu forlasas la ŝancon." La alia estas 52-jara Luo Yupu. Li avidas diplomon kaj estas memfida je tio. Li diris: "Mi ja estas pliaĝa, tamen mi akiras pli ol 90 poentojn en ĉiu ekzameno. Akirinte fakan diplomon, mi partoprenos la unuigitan ekzamenon por adoltoj kaj certe kvalifikiĝos kiel diplomito.

ASPIRO DE LA KRIPLULOJ

Hao Tuo estas 26-jara laboristino de la Ĉina Esplor-Centro pri Konvalesko. Ŝi, malkaŝema, parolas ĉiam kun rideto. Se lambastonetoj ne starus apud ŝi, mi ne kredus, ke ŝi estas paraplegiulo. Hao diris al mi: "Mi volas studentigi eĉ en sonĝo."

Abiturientiginte en 1982, Hao Tuo per brilaj sukcesoj trapasis la eniran ekzamenon por alta lernejo, sed pro sanstato ŝi ne estis akceptita. Pro tio ŝi afliktiĝis kaj grave malsaniĝis. Kuraĝigate de siaj gepatroj ŝi vigliĝis kaj komencis memlernadon. En 1983 ŝi eklernis fremdan lingvon en radio-kurso, logikon kaj samtempe literaturajn historiojn ĉinan kaj fremdlandan, kaj legis grandan nombron da literaturaj verkoj.

Ŝi diris, ke tiam ŝia sola celo en la lernado estis akiri pozicion en la socio kaj vivteni sin mem. Ŝia deziro realiĝis. En 1986 ŝi estis dungita de la Ĉina Esplor-Centro pri Konvalesko kaj psikologie konsultiĝis al la kripluloj.

Por levi sian laborkapablon, ekde 1987 ŝi ĉiutage iris al la psikologia kurso de la Pekina Instruista Universitato, sin apogante sur lambastonetoj, kaj lernis tie unu jaron kaj duonon.

En 1989 ŝi sukcesis en la ekzameno por la fako de la ĉin-lingva praktiko de iu poradolta universitato. Post laborhoroj ŝi sen manĝi

iris al la lernejo kaj post la leciono memlernis ĝis profunda nokto. En la unua semestro ŝi akiris pli ol 95 poentojn en ekzameno por ĉiu el la 4 studobjektoj kaj, en la sama jaro, en la konkurso pri artikoloj organizita de la centro ŝia verko "Ho, maro!" gajnis la unuan premion.

Koncerne ĝojon kaj malĝojon en la lernado, ŝi diris: "En la lernado mi akiris pli da scioj kaj levis laborkapablon. Mi ricevis diplomon de alta lernejo, same kiel sana homo. Ĉu oni povas diri, ke tio estas malĝojo?"

LERNADO POR LABORO

"Mi lernas nur por laboro," diris 37-jara Yan Jun.

En 1983 Yan eklernis en la fako pri entreprena administrado de la Poradolta Universitato sub la Pekina Laborista Sindikato. Post du jaroj kaj duono li finis sian studon per elstaraj sukcesoj. Post diplomigo li, ordinara laboristo, fariĝis vicestro de la Pekina Tria Fabriko de Radioaparataj Elementoj. En 1986 la fabriko aĉetis kompleton da alilandaj teknikoj kaj instalaĵoj por produkti potenciometrojn kontraŭ 5.2 milionoj da usonaj dolaroj. Tio estis la plej granda enkondukita objekto, tamen pro diversaj kaŭzoj la administrado de la fabriko estis

Lernantoj de belarta fako

en malordo, kio serioze malhelpis la produktadon. En tiaj kondiĉoj Yan Jun neniom timis kaj, aplikante la lernitajn sciojn pri administrado de industriaj entreprenoj, solvis la malfacilojn en la produktado, tiel ke la produktado pli kaj pli boniĝis. Post unu jaro la fabriko gajnis milionon da juanoj da profito, sed antaŭe ĝi havis deficon de 400 000 juanoj. En 1989 la supera instanco taskis al ĝi la normon de jara profito de 1.9 milionoj da juanoj, sed ĝi gajnis en la unua duonjaro 2.2 milionojn da juanoj da profito kaj Yan Jun fariĝis fabrikestro.

Yan emocie diris: "Sen la studo mi ne atingus la hodiaŭajn sukcesojn."

Mi intervjuis plurajn fruktondonajn studentojn, kia Yan Jun. Zhang Peifen, diplomite el mediprotekta fakultato, aplikis novajn sciojn por solvi la malfacilojn en la media polucio de sia fabriko. La de ŝi projektita konstruaĵo ellasas malpli da fenhavaj objektoj laŭ la internacia normo. Yu Jiansan, ofiĉisto de Xisi-filio de la Ĉina Popola Konstrua Banko, estas diplomito de la ĉin-literatura fakultato de la poradolta universitato. Li plurfoje publikigis en ĵurnalo raporton pri plibonigo de la laboro. Oni honoras lin bonedukita intelektulo. ■





Wang Qiuping

Yan Jun (dekstre) en laborejo

Lernantoj



Humen post sia malfermiĝo

Teksto de ZHENG ZHENJIE

Fotoj de WU XINHUA

Jam pasis dek jaroj, de kiam Ĉinio ekpraktikis pordomalferman politikon. La Delto de Perlo-rivero estas unu el la regionoj, kiuj la unuaj malfermis sian pordon al aliaj landoj. Kiuj ŝanĝiĝoj okazis en la tiea ekonomio kaj popola vivo en la pasintaj dek jaroj? Ni konigos ilin al niaj legantoj unu post alia en la revuo.

La Red.

LA riveroj Xijiang, Beijiang kaj Dongjiang, branĉoj de Perlo-rivero, trafluante la aŭtonoman regionon Guangxi kaj la provincojn Hunan kaj Jiangxi, torentas suden kaj kunfluas ĉe Kantono, la plej granda urbo de suda Ĉinio. Tie ili disbranĉiĝis en centojn da riveretoj, kiuj malrapide trafluas aluvian ebenaĵon kun areo de 11 000 kvadrataj kilometroj, kaj formiĝis la bela kaj riĉa Delto de Perlo-rivero. Ĝi konsistas el 28 urboj kaj gubernioj, inkluzive de Kantono kaj la specialaj ekonomiaj distriktoj Shenzhen kaj Zhuhai, kun ĉ. 20 milionoj da loĝantoj.

Lastan novembron, mi kaj fotis-

to Xiao Wu faris unumonatan oficevojaĝon en la urboj Dongguan, Foshan, Jiangmen kaj Zhongshan kaj la gubernioj Nanhai, Shunde kaj Xinhui en la Delto de Perlo-rivero. La delto estas konata kiel lando abunda je fiŝoj, rizo, fruktoj kaj legomoj en Ĉinio. Dank' al praktiko de la pordomalferma politiko en la lastaj dek jaroj, aperis nova aspekto en la loko. Bonorde aranĝitaj fabriksdomoj kaj novaj domoj hele kolorigitaj kuŝas inter rizkampoj, fiŝlagetoj kaj sukerkanoj. Laŭlonge de la rivero troviĝas 36 havenoj por ekstera komerco, kiuj ĉiutage akceptas centojn da pasaĝer- kaj kargo-ŝipoj. Tie fluas multaj riveroj. Antaŭe oni devis peti asignaĵon de la ŝtato por konstrui ponton. Por tio estis malfacile akiri monon, oni devis nur atendi ĉe kajo pramon por transiri riveron, eĉ por kelkaj horoj. Nun oni rompis la rutinon kaj kolektas monon por konstrui ponton. En la dek jaroj oni konstruis pli ol 2 000 pontojn, kiuj multe faciligas kontakton inter homoj kaj akcelas ekonomian disvolviĝon. Grandegaj

kontener-kamionoj kun nombroplatoj de Guangdong kaj Hongkong, ŝarĝitaj per krudmaterialoj aŭ produktaĵoj, navetas inter la landinterno kaj Hongkong. Survoje troviĝas po unu servo-stacio por kelke da kilometroj. La kvieto sur la kamparo antaŭ longe rompiĝis kaj anstataŭe aperis nova vivmaniero.

Dank' al la pordomalferma politiko, la totala industria kaj agrikultura produktovaloro kaj la totala valoro de ekstera komerco de la Delto de Perlo-rivero, kun areo malpli vasta ol duono de Guangdong-provinco, konsistigas pli ol 80% de tiuj de la provinco, kaj la financa enspezo de la delto pli ol 90% de tiu de la provinco. Ĝi estas "fenestro" por koni la viveplenan provincon.


PROSPERO DE HUMEN


Preskaŭ ĉiuj maljunaj ĉinoj scias Humen. Ĝi famas ne nur pro tio, ke ĝi estas la plej granda el la 8 enmariĝoj de Perlo-rivero, sed ankaŭ pro tio, ke ĝi estas loko, kie

Anasoj de Humen



Mikroondaj fornoj produktitaj de entrepreno starigita per kapitalo de Ĉinio kaj alia lando





Nova ŝosea ponto kun larĝa spango

ĉina nacia heroo Lin Zexu forbruligis pli ol milionon da kg da opio en la Opia Milito en 1840 kaj konstruigis fuortojn por rezisti kontraŭ la britaj agresantoj ekster Humen. La putra Qing-registaro (1644-1911), timigite de la brita armita forto, devigite subskribis interkonsenton, malfermis kvin havenojn, inkluzive de Kantono, kaj koncesiis Hongkong. De tiam komercŝipoj de diversaj imperiismaj landoj veturis en kaj ekster Humen.

Pasis pli ol unu jarcento. Hodiaŭ, denove malfermis sian pardonon la multjare fermita Humen. Nun alvenintoj ne plu estas alilandaj rabistoj, sed ĉefe komercistoj kaj entreprenistoj el aliaj landoj kaj la regionoj Hongkong kaj Aomen. Ili venas fari investon kaj komercon kaj funkciigi fabrikojn.

Sur la monto, kie staras bronza statuo de Lin Zexu, iu lokano emocie diris al mi, ke septembre de 1978, kiam malfermiĝis Humen, alilanda komercisto ekfunkciigis en tiu urbeto kun kelkaj simplaj

fabrikoj la unuan entreprenon Taiping-a Mansaka Fabriko, sed iuj diris, "ĉu estas permesite denove perdi la teritorion". Tio montris komplikajn sentojn de la popoloj, kiuj multe suferis de la agreso antaŭ la Liberiĝo. Tamen, post kelkatempa negocado kun la komercisto, ili bone komprenis, ke la pordomalferma politiko praktikata de la ĉina registaro, sin bazante sur egalrajteco kaj reciproka utilo, estas tute diferenca de la perdo de la suvereneco kaj humiligo de la nacio far la tiama putra registaro, kaj ĉia dubo ilin forlasis. De la lastaj dek jaroj, en la urbeto Humen, jam funkcias 340 entreprenoj, el kiuj iuj faras prilaboron de materialoj kaj specimenoj, muntadon kaj kompensan komercon, kaj la aliaj estas investitaj sole de alilandaj komercistoj, kune de Ĉinio kaj alia lando, aŭ administrataj kunlabore. Formiĝis 14 industriaj distriktoj, el kiuj 4 estas en la urbeto kaj 10 dislokiĝas en vilaĝoj. La ĉefaj produktaĵoj estas fajraĵoj, kandeloj, elektraj fadenoj

kaj kabloj, ladmanĝoj, cemento, ledaĵoj k.a. Nemalmultaj produktaĵoj atingis landan kaj mondan nivelojn. Plejparto de ili vendiĝas en sudorienta Azio, Eŭropo, Ameriko, Mez-Oriento kaj la regionoj Hongkong kaj Aomen.

Mi rigardis la Taiping-an Artfloran Fabrikon konstruitan kune de la urbeto kaj komercisto el Hongkong. La fabriko, uzante plej avangardan elektronikan kolorselektan teknikon, presis tigojn kaj foliojn de planto sur silkaĵo. Post alttemperatura formigo kaj aliaj traktoj estas elfaritaj diversaj miniaturaj envazaj pejzaĝoj, kiuj povas esti metitaj sur balkonon aŭ en ĉambron. Tiel, oni aprecas kvaŝaŭ kvietecon kaj elegantecon de montoj, riveroj kaj kampoj.

Antaŭe, loĝantoj en Humen povociis nur plugadon aŭ komercon. Nun, la kontakto kun komercistoj kaj entreprenistoj de diversaj landoj plimultigis ilian scion kaj plilarĝigis ilian vidkampon. Ekaperis serioza kaj konscienca laborstilo. Ekz., nemalmultaj entre-

prenistoj de aliaj landoj, Hongkong kaj Aomen venas trakti negocon. Ofte okazas, ke ili finplenumas en nur unu aŭ du tagoj la taskon trakti negocon, ricevi vizon, registri sin en koncerna oficejo, peti importan permesilon kaj plenumi formalaĵon por aŭte veturi rekte al Hongkong kaj Aomen.

“KVAR TIGRETOJ”


Dum la vojaĝo en la Delto de Perlo-rivero mi rimarkis ion similan inter Humen kaj aliaj urbetoj. Ekz., antaŭ dek jaroj oni sin okupis nur pri grena produktado, kaj la avantaĝoj de riĉfonto kaj laborforto estis katenataj. Novaj politikoj akcelas la ekonomian disvolvigon de la delto. Nanhai, Shunde,



Fuorto de Humen

Kampoj sur la Delto de Perlo-rivero





Nova urbeto

Horloĝa fabriko de Dongguan konstruita per investo de la Hongkong-a Horloĝa Kompanio Guanya



En la Guizhou-a Marmita Fabriko



Zhongshan kaj Dongguan rapide disvolviĝis kaj ricevis la nomon "Kvar Tigretoj" sur la Delto de Perlo-rivero. Ilin sekvas aliaj gubernioj kaj urboj por sin disvolvi.

En Nanhai mi vidis, ke funkciigas fabrikojn la urbetoj, vilaĝoj, produktaj brigadoj kaj asociitaj familioj. Tiuj entreprenoj plejparte apartenas al la kategorio de kolektiva ekonomio. Ili, kun granda memstareco, donas al la ŝtato profiton kaj imposton laŭleĝe kaj estas pli fortaj ol individuaj entreprenoj. Ĉiuj zorgas pri entreprenoj, ĉar la efiko de la entreprenoj rilatas rekte al la interesoj de la laboristoj kaj oficistoj kaj la enspezo de la kadroj de la urbetoj. La konkurenco decidas, ke ili nepre devas altigi la kvaliton de produktaĵoj por gajni superecon en merkato, sekve, ili tre atentigas kulturajn teknikajn talentulojn kaj neniam ŝparas investon de intelekto.

Shunde antaŭeniras, helpate de 12 industriaj satelit-urboj, kiaj Daliang, Guizhou, Beijiao, Chenlin kaj Rongqi. En la lastaj jaroj la totala industria kaj agrikultura produktovalorado de la 12 satelit-urboj superis 100 milionojn da juanoj respektive. La totala produktovalorado de industrio kaj agrikulturo de Guizhou-urbeto en 1978 estis 46 milionoj da juanoj, kaj 1.2 miliardoj da juanoj en 1989. Sed en iuj malriĉaj regionoj de norda Ĉinio, la totala produktovalorado de industrio kaj agrikulturo de unu gubernio ne superis 100 milionojn da juanoj aŭ atingis nur 100-200 milionojn da juanoj.

La urbo Zhongshan estas la hejmloko de D-ro Sun Jatsen (1866-1925), pioniro de la ĉina revolucio, ĝia turisma afero kun aparta trajto akcelas disvolviĝon de aliaj flankoj. De 1979 ĝis nun ĝi uzis kapitalon de pli ol 300 milionoj da hongkong-aj dolaroj kaj konstruis 12 modernajn hotelojn en stilo de tiuj sude de la kvin montaroj en Ĉinio kaj aliajn turismajn instalaĵojn, en kunlabora administrado, kiuj altiris grandan nombron da ĉinaj kaj alilandaj turistoj.

La urbo Dongguan, kiu tuŝas Hongkong sude kaj Kantonon norde kaj najbaras al la speciala ekonomia distrikto Shenzhen, multe disvolviĝas en industrio kaj agrikulturo, per prilaboro de materialoj kaj importado de alilandaj kapitaloj kaj teknikoj. Iatempempe, la urbo devas subskribi 4-5 kontraktojn koncerne tian prilaboron ĉiutage, tial ĝi fondis "la Dongguan-an Oficejon de Prilaboro kaj Muntado". Nun tie funkcias almenaŭ 3 600 tiaj entreprenoj, kun totala enspezo de 630 milionoj da usonaj dolaroj en dek jaroj. Materialo-prilaboro ne nur liveras fidindan kapitalon al la plua disvolviĝo de industrio kaj agrikulturo de Dongguan, sed ankaŭ partoprenigis 300 000 superfluajn laborulojn el la vilaĝoj kaj almenaŭ 450 000 alilokajn laborulojn. Jam solviĝis la problemo de senlaboreco. Antaŭe, 80% de la tieaj homoj okupiĝis pri agrikulturo, tamen ankoraŭ ne solviĝis la problemo pri vivteno. Nun nur 30% de la laborfortoj okupiĝas pri agrikulturo, kaj la aliaj pri industrio kaj servoj. La meznombra jara salajro de la oficistoj kaj laboristoj de la urboj kreskis de 474 juanoj en 1978 al 2 700, la meznombra neta jar-enspezo de la kamparanoj atingis 1 200 juanojn, 5-oble pli multe ol tiu antaŭ dek jaroj.

LA DELTO KAJ HONGKONG

Antaŭ ol la ĉina registaro decidis malfermi la Delton de Perlo-rivero kiel pordomalferman ekonomian distrikton en januaro 1985, tre viglis la tiea ekstera ekonomio. Najbare al Hongkong, la Delto de Perlo-rivero kun multe da laborfortoj kontaktiĝas ĉiuflanke kun ĝi en ekonomio. En la lastaj dek jaroj la landinterno kaj Hongkong kune ekfunkciigis pli ol 12 000 entreprenojn kun 1.5 milionoj da oficistoj kaj laboristoj.

Mi informiĝis de iu komercisto el Hongkong, ke pliboniĝis la kondiĉoj funkciigi fabrikojn en la delto. La elspezo por konstrui fabriksdomon kaj laborpago estas multe

malpli grandaj ol tiuj en Hongkong. Iu ludila kompanio de Hongkong havis nur 3 000 laboristojn antaŭe. La disvolviĝo de la internacia merkato postulis grandegan kreskon de produktaĵoj. Pro manko de laborfortoj k.a., ĝi ne povis plenumi la postulon de la merkato. Poste, ĝi ekfunkciigis 7 filiojn en Kanton kaj Dongguan, kaj tiel solviĝis la problemo longe nesolvita en Hongkong.

En la lastaj jaroj aperis en la delto novaj tendencoj en la industrio pri ekstera prilaborado kaj muntado.

Unue, surbaze de nombrokresko ĝi liveras krome altgradajn produktaĵojn. Nemalmultaj materialo-prilaboroj apartenas al kategorio de energio, trafiko kaj komunikado kaj postulas superteknikon kaj grandan investon. Due, la fiksa kapitalo estas investita de alilandaj komercistoj. Pro tio, ke en la lastaj jaroj la landinterno superregis la investon de fiksa kapitalo, al plejparto de la delta regiono mankas kapitalo por konstrui fabriksdomon, kaj oni eĉ ne povas daŭrigi konstruadon de iuj fabriksdomoj. Multaj alilandaj komercistoj do investis por konstrui fabriksdomojn anstataŭ liveri nur ekipaĵojn kaj materialojn. Tio montris, ke ili fariĝis pli malproksimvidaj. Tiel aperis nova formo en la ekstera prilaborado kaj muntado en la delto. Trie, la komercistoj venas el multaj landoj kaj regionoj. Antaŭe venis tien nur komercistoj el Hongkong. Nun venas tien ankaŭ komercistoj el Usono, Kanado, Japanio, Sud-Koreio, Okcidenta Eŭropo kaj Norda Eŭropo. De 1988 rimarkinde multiĝis komercistoj el Taiwan. Kaj kvare, iuj lokoj sisteme uzas alilandajn kapitalojn kaj importas teknikojn. Ekz., la urbo Huizhou konstruas aŭto-urbon kontraŭ 200 milionoj da usonaj dolaroj. En Xinhui-gubernio mi informiĝis, ke ĝi uzas alilandajn kapitalojn ĉefe en produktado de polipropilena fibro, kaprono kaj poliestera fibro kaj faras sintezan produktadon de tekstilaĵoj, tinkturaĵoj kaj vestoj. ■

Pri la poemo “Okcidenta mont-rojo de Chuzhou”

de DI ZI

*Kvietajn herbojn ĉe l' mont-roj' kompatas
mia koro,
dum supre en arbara fundo kantas oriolo.
Printempa tajdo kun pluvego viglas en vespero,
ĉe la pramej' dezerta flosas orfe l' pram' laŭ volo.*

Jen la poemo “Okcidenta mont-rojo de Chuzhou” de Wei Yingwu, kiu vivis en la meza periodo de Tang-dinastio. La poeto iam estis oficisto de Chuzhou (la nuna Chuxian de Anhui-provinco). Okcidente de Chuzhou estis antikva pramejo. La poeto prikantis la ĉarman printempan vesperon post pluvo.

Herbo havas fortan vivipovon kaj plej frue anoncas alvenon de printempo. La kvietan valon verdigitan de prosperaj herboj vigligas de tempo al tempo oriola kantado. La glacia tero degelas kaj gaje rojadas akvo post la printempa pluvo. La fluo plaŭdas kontraŭ la pramsipeto malplena pro vesperiĝo kaj pluvo.


La antikvaj poemoj kaj la ĉinstilaj pentraĵoj havas intimajn rilatojn inter si. En 1119-1125 de Song-dinastio la ŝtata piktura akademio faris akceptan ekzamenon ofte kun antikvaj versaĵoj kiel ekzamenaj demandoj. “Ĉe la pramej' dezerta flosas orfe l' pram' laŭ volo” estis unu el tiaj demandoj. Multaj kandidatoj malsukcesis pro sia emfazo de “pramej' dezerta”. Estis sukcesinto, kiu pentris boatiston kuŝantan sur pramo kaj ludantan fluton. Li lerte reaprigis la scenon “pramej' dezerta”. Estas alia diro, ke la sukcesinto pentris birdon starantan sur la pruo de boato por esprimi “dezertan medion”.


S-ino Zhōu Xiuqing (Ĝoŭ Siŭĉing) faris por la poemo pentraĵon. Ŝi emfazas printempan medion en la pentraĵo per maldensaj netravedeblaj variaj verdaj. Oni povas trovi du flavajn makuletojn sur la verda fono, kio imagiĝas oriolojn en “arbara fundo”. La verde tapiŝitaj montoj, supraj salikaj ŝosoj, densaj kaj veluraj herbaroj kaj pluveto, ĉio prenas verdan koloron el multaj varioj, per kio la pentristi-

no sukcese surpaperigis la printempan vidaĵon.

Ankaŭ la kaligrafaĵo estis farita de s-ino Zhou. Ŝi estas vicprofesoro de ĉinstilaj pentraĵoj en la belarta fakultato de la Ŝtata Instituto de Nacimalplimultoj. Ŝi estas sukcesinto kaj en pentrado kaj en kaligrafio. ■

Kaligrafaĵo de Zhou Xiuqing







山水清音



Ĉina ŝako (IV)

de RONG HUI

FORMACIIGO DE LA UNUA MOVFARANTO

Tio estas aranĝoj de la unua movfaranto en la ĉina ŝakludo. Ili decidas la evoluon de la tuta ludo. Ofte vidiĝas ok formacioj:

A. Kanono sur la 5-a linio. Movi la kanonon sur la 2-a linio maldekstren al la 5-a aŭ la kanonon sur la 8-a dekstren al la 5-a. La aranĝo de kanono minacas la mezan soldaton de la rivalo, celante la ĉefgeneralon, tial la rivalo nepre devas fari defendan movon.

B. Kanonoj sur la 5-a kaj 6-a linioj. Unue movi la kanonon sur la 2-a linio maldekstren al la 5-a kaj due la kanonon sur la 8-a dekstren al la 6-a. Tia aranĝo, oportuna por atako kaj defendo, povas plenumi diversajn taskojn, precipe por kontraŭstari al ekranaj ĉevaloj (ĉevaloj, kiuj movas sin de la 2-a kaj 8-a linioj al la 3-a kaj 7-a linioj por defendo).

C. Kanonoj sur la 5-a kaj 7-a linioj. Unue movi la kanonon sur la 2-a linio maldekstren al la 5-a

kaj due la kanonon sur la 8-a dekstren al la 7-a. Tio estas elasta aranĝo, la kanono sur la 7-a linio minacas la ĉevalon sur la 3-a linio de la rivalo, kiu movas sin de la 2-a linio al la 3-a kaj tiel malfortigas la mezan defendon de la rivalo kaj kunhelpas la atakon de la kanono sur la 5-a linio.

Ĉ. Kanonoj sur la 5-a kaj 8-a linioj. Unue movi la kanonon sur la 2-a linio maldekstren al la 5-a kaj due la kanonon sur la 8-a antaŭen je 4 paŝoj. Oni faras tian aranĝon nur post kiam li movis la soldaton sur la 3-a linio antaŭen je unu paŝo kaj la rivalo movis la soldaton sur la 3-a linio antaŭen je unu paŝo. Per tia aranĝo la ludanto celas movi la kanonon sur la 8-a linio dekstren al la 7-a por bari la ĉevalon, ataki la elefanton, malhelpi la ĉaron, ĉevalon kaj kanonon de la rivalo kaj ŝirmi siajn ĉevalon kaj soldaton sur la 3-a, transiri la limriveron kaj doni grandan minacon al la ekranaj ĉevaloj de la rivalo (Vd. bildon 1).




D. Avanco de soldato. Movi la soldaton sur la 3-a aŭ 7-a linio unu

paŝon antaŭen. Tio estas modera kaj komplika aranĝo, celante koni dispozicion de la rivalo kaj malfermi la vojon al sia ĉevalo. Sed tia aranĝo ne donas rapidan ofensivon kaj kaŭzas facilan atakon de la rivalo.

E. Palaco-transira kanono. Movi la kanonon sur la 2-a linio maldekstren al la 6-a aŭ la kanonon sur la 8-a maldekstren al la 4-a. La aranĝo celas movi siajn gvardianon kaj elefanton al la 5-a linio por fortigi gardon kaj atendi ŝancon por ataki. Tia aranĝo estas konservativa. Se la rivalo faras hastan atakon, la transpalaca kanono kaptos ŝancon por atako. Sed, kiam la rivalo bone konas tian aranĝon, la ludanto sin katenas pro malfortigo de sia alia alo.


F. Tri tigraj paŝoj. Oni movas la ĉevalon sur la 2-a antaŭen al la 3-a, la kanonon sur la 2-a dekstren al la 1-a kaj la ĉaron sur la 1-a maldekstren al la 2-a. Tion oni nomas tri tigraj paŝoj. La ludanto frue elpaŝigas la ĉaron, tio multe minacas hastan atakon de la rivalo (Vd. bildon 2).

G. Kanono en la centro de palaco. Movi la kanonon sur la 2-a maldekstren al la 5-a, movi ĝin malantaŭen je unu paŝo kaj la kanonon sur la 8-a dekstren al la 5-a. Tia dispozicio celas rapide ataki la mezan soldaton de la rivalo, kunhelpate de la ĉevaloj. Tia dispozicio estas ofensiva kaj efika, tamen ĝi kovas grandan danĝeron al si (Vd. bildon 3).





Antikvaj palacaj knabinoj (Ĉina puzzle)



Bonvolu ŝanĝi unu alumeton al ĉiu egalajo por ke ili estu ĝustaj. (La solvoj troviĝos en la sekvanta numero.)

Solvo por "Preni ŝakpecojn"

Se vi la unua prenas ŝakpecojn, vi certe gajnos la ludon. Por restigi almenaŭ unu ŝakpecon sur la tablo ĉe la fino, vi devas restigi al la partnero 28, 21, 14, 7 ŝakpecojn respektive en la antaŭaj ĉiuj fojoj. Do en la ludo vi antaŭ ĉio prenu 2 ŝakpecojn, kaj poste, ĉiufoje prenu tiom da pecoj, kies nombro plus tiu de la deprenitaj pecoj de via partnero estas ĝuste 7, kaj fine vi certe enmanigos al vi la lastan ŝakpecon.

ANONCO

I. Por korespondanconco

2 internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj (50% da rabato ni donas al Esperantaj organizoj kaj niaj perantoj)

II. Por perado de aĉeto

20% de la kosto por la aĉetaĵoj kiel makleraĵo

III. Por Esperantaj anonco kaj reklamo

1 paĝo nigra-blanka 400 USD, 1/2 p. 250 USD, 1/4 p. 130 USD, 1/8 p. 70 USD, 1/16 p. 40 USD.

IV. Por komerca reklamo

1 paĝo kolora dorskovrila 1700 USD, 1/2 p. 900 USD,

1 p. interna kolora 1500 USD, 1/2 p. 800 USD,

1 p. interna nigra-blanka 700 USD, 1/2 p. 400 USD.

La varbintojn de reklamoj ni rekompencos per 10% de la enspezo.

Bonvolu sendi vian pagon al:

El Popola Ĉinio, 24 Baiwanzhuang Rd.

P/A BANK OF CHINA (Head Office), Beijing, China

ABONTARIFO DE EPĈ POR 1990

Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	AUD	15.50	25.5	35.5
Aŭstrio	ATS	210	350	490
Belgio	BEF	600	980	1350
FR Germanio	DEM	32	52	72
Britio	GBP	9	14.5	20
Finnlando	FIM	70	115	160
Francio	FRF	100	160	220
Hispanio	ESP	1500	2400	3400
Italio	ITL	20000	32500	45000
Japanio	JPY	3000	5400	7500
Nederlando	NLG	35	59	83
Nov-Zelando	NZD	21	35	49
Portugalio	PTE	1500	2400	3400
Svisio	CHF	26	43	62
Usono	USD	15	25	35
Kanado	CAD	15	24	34

Por aliaj landoj en Eŭropo:

USD 11 18 25

Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:

USD 7.5 12 17


Generala distribuanto: Esperanta Sekcio de Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJISHUDIAN), P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

LAŬ LA SUDA SILKA VOJO (11)

En la Malsupra Baseno de Minjiang-rivero

Teksto de WANG QINGHUA kaj XU YE

Fotoj de XU JINYAN



Granda budhostatuo de Leshan

Survoje al pramejo



En Wutongqiao

KIAM Minjiang-rivero trafluas Leshan, en ĝin enfluas Qingyi- kaj Dadu-riveroj, tial multe larĝiĝas ĝia malsupra parto. Se oni veturas malsupren laŭ la rivero, oni povas ĝui naturajn pejzaĝojn de suda Sichuan-provinco.

GRANDA BUDHOSTATUO DE LESHAN


Leshan estis nomata Jiazhou (Ĝjaĝoŭ) en la antikveco. La urbo distancas de Chengdu je pli ol 160 km. Leshan famas ĉefe pro sia granda budhostatuo. La budhostatuo skulptita el roko rigardas al la rivero. La budho altas 71 m, lia nazo longas ĉ. 6 metrojn, kaj 100 homoj povas sidi sur lia instepo. En 1979 oni uzis 3 000 brikojn por ripari unu fingron. La skulptado de la budho komenciĝis en 713 kaj finiĝis en 803. Ĝin kreis bonzo Haitong de Guizhou (Gujĝoŭ)-provinco. Li dediĉis sin al budhisma arto kaj estas multe respektata de la posteuloj. La granda budho de Leshan, kiel monumento de budhisma arto, estas multe vizitata de ĉinaj kaj alilandaj turistoj.

INTERESAĴOJ EN WUTONGQIAO

La malgranda urbeto Wutongqiao (Utongĉjaŭ) situas 20 km sude de Leshan. Kiel sude de Yangzi-rivero, tie abundas akvoj kaj pontoj. De la pasintaj jaroj disvolviĝis primora turismo en la urbeto. Ĉu en hoteloj, ĉu en domoj de loĝantoj, la turistoj povas sperti enhavoriĉan vivon de la indiĝenoj. Ili povas fiŝhoki ĉe Minjiang-rivero, aĉeti legomojn en bazaro, mem prepari Sichuan-ajn pladojn, kuiri rizbulojn volvitajn per fragmitaj folioj, manĝi junan maizon, lerni kaligrafion kaj pentradon.

En la urbeto ni konatiĝis kun kuiristo de pli ol 40 jaroj, kies moknomo estas koko-sinjoro Chen. Li famas per pentrado de kokoj, kvankam li profesias kiel kuiristo kaj lerte preparas Sichuan-ajn pladojn, precipe festenon sole el kokaĵoj. Liaj butikoj kaj pentrejoj sidas tuj apud Minjiang-rivero, sen ajna elpendaĵo, sed ĉiuj lokanoj scias, ke tie loĝas kaj laboras koko-sinjoro Chen. Oni jam forgesis, kio estas lia vera nomo.

Kontraŭ Wutongqiao, trans la rivero, estas fameta antikva urbeto




Xiba. Ni surbordiĝis kaj eniris en malnovan straton laŭ ŝtona ŝtuparo kaj antaŭ niaj okuloj prezentigis malnovtipaj lignaj domoj kun fasado renovigita laŭ moderna gusto. Ni venis tien ĉefe por gustumi toŭfuajn pladojn de Xiba. Ni frandadis toŭfuajn pladojn en restoracio. Estas malfacile kredi, ke oni povas prepari ĉ. 70 malsamajn pladojn el toŭfuo: akragusta, fritita kune kun ursopiedo, osmantspicita, diserigita ktp. Toŭfuo de Xiba estas delikata, neĝblanka kaj ege apetita. La akvo uzata por produkti toŭfunon estas bonkvalita kaj sensala. Tie oni povas produkti el samkvantaj sojfaboj duoble pli multe da toŭfuo ol trans la rivero.

De la lastaj jaroj la Drakboata Festo de Leshan, kiu okazas la 5-an de la 5-a monato laŭ la ĉina lunkalendaro, fariĝas granda soleno kultura, sporta, komerca, scienca, teknika kaj turisma. La spektakla surakva konkurso estis influa kultura efeto, kiun la esplorantoj nomas "drakoboata kulturo".

URBETO EN FORMO DE FIŜŜIPO

Ni ŝipveturis de Wutongqiao suden laŭ Minjiang-rivero kaj atingis la antikvan urbeton Luocheng (Lŭoĉeng) en formo de fiŝŝipo. Kun lerta dispozicio kaj originala strukturo, ĝi aspektas kiel granda fiŝŝipo. Ĝia arkitekturo interesas ĉinajn kaj alilandajn arkitektojn. Por turismo oni konstruis tian ur-





Minjiang-rivero

beton en Melburno, Aŭstralio.

La urbeto Luocheng konstruiĝis en 1627-1644. Ĝi, kiel trafika nodo, servis en Qing-dinastio (1644-1911) kiel poŝtstacio kun la nomo Luochengpu. Antaŭe, ĝi havis kvar pordojn, kvar stratkruciĝojn, ok templojn kaj naŭ stratojn. Meze de la ĉefstrato kun du mallarĝigantaj finoj estas antikva scenejo. La ŝedoj ekster la butikoj ambaŭflanke de la strato larĝas 5-6 metrojn kaj la interspaco estas nur ŝultrolarĝa. Ni eniris en la urbeton laŭ ĝia malantaŭo, kiam estis foira tago. La strato estis plene okupita de homoj. La templo Lingguan en la malantaŭo aspektas kiel posta kajuto de ŝipo. Ĉirkaŭ la templo oni vendis ĉefe anasojn kaj anserojn. Plej interesa estis tio, ke

pluraj muskolaj viroj portis sur si po pli ol 20 blankajn anserojn por vendi. En la alia flanko de la templo vendiĝis ruĝaj kandeloj, incensoj kaj stanaj oferpaperoj. Plejparto de la klientoj estis maljunulinoj. Post kiam ili revenos hejmen de la foiro, ili bruligos la kandelojn kaj forbruligos oferpaperojn por esprimi respekton al siaj prapatroj kaj kvietigi sian animon. Iuj maljunuloj sidis ĉe tabloj antaŭ muroj kaj skribis gratulajn versparojn kaj bonaŭgurajn vortojn por partoprenantoj de la foiro laŭ ilia peto. La skribantoj ne estis alte klerigitaj, tamen ili bone komprenis la petantojn kaj kontentigis ilin per sia servo. La du-etaĝa scenejo kun leviĝanta tegmentrando estas subtenata de ŝtonaj kolonoj. Sub la scenejo estas trairejo. Nun la ŝtu-

paro por ascendi la scenejon jam detruigis kaj neniu prezentas sur ĝi, kaj sub la scenejo metiĝas tabloj por bilardo, ĉirkaŭ kiuj svarmis homoj, kio malfaciligis trapason. En la ŝedoj ambaŭflanke de la strato oni faras komercon en ĉia vetero. En la ŝedoj unuflanke de la strato vendiĝas diversaj ŝtofoj kaj drapoj. Iuj klientoj aĉetis multe da ŝtofoj kaj ilin portis en dorskorboj. Aliflanke vendiĝas tabakfolioj kaj aliaj lokaj produktaĵoj. Oni povas gustumi antaŭ ol aĉeti tabakfoliojn.

ANTIKVA PRAMEJO QIANWEI

Qianwei(Ĉjanŭej)-gubernio, situas 50 km sude de Leshan, okcidente de Minjiang-rivero.

La antikva scenejo de Luocheng



La urbomuro de Qianwei iras laŭ la rivero kaj havas naŭ pordojn kaj 13 ŝtonajn kolonojn. Antaŭ ĉiu pordo staras bazamento el longaj ŝtonpecoj, laŭ kiu oni povas eniri la guberni-urbon tra la pordo. Sur la arkŝtonoj de la ekzistantaj kvar pordoj ankoraŭ videblas profundaj postsignoj lasitaj de haŭlistoj siatempe. La dika muro ne plu ludas defendan rolon, kaj sur ĝi staras multaj loĝdomoj. Maljunulo de pli ol 70 jaroj rakontis al ni jenan historieton: En 1934 Minjiang-rivero inundis. La inundo ĵetiĝis tra la pordoj en la urbon, tamen la muro neniom difektiĝis. Infanoj distriĝis sur la muro. Hodiaŭ Minjiang-rivero malprofundiĝis



Ĉe strato de Luocheng


kaj la muro jam pli longe distancas de la rivero. Sur kampoj ĉe la muro kreskas legomoj. La vojo al la rivero estas pavimita el rulŝtonoj kaj sablo kaj ambaŭflanke de ĝi prosperas herbo kaj musko.

Qianwei komunkiĝas kun aliaj lokoj ĉefe per akvovojo kaj aŭtojo devas transpasi la riveron per pramŝipo.

En Qianwei prosperas akva trafiko, sed ne viglas tera trafiko kaj

nun ankoraŭ konserviĝas la tradicia trafiko. En la loko ankoraŭ servas bestoĉaro. La ĉaro estas tirata de bovoj. La ĉaroj plejparte havas lignajn radojn, parte pneŭmatajn bendojn. La ĉaroj knaradas plensarĝite.

En la Okcidenta Strato de Qianwei bone konserviĝas 20 m alta arkaĵo, simbolo de feŭda etiko de la malnova Ĉinio. Se vidvino tenis dumvive la vidvinecon, ŝi povis gajni post sia morto la gloron de



Laboristino de silka fabriko

starigo de arkaĵo. La moro antaŭe cirkulis preskaŭ en la tuta Sichuan-provinco kaj tiaj arkaĵoj videblis ĉie en ĝi. Aliflanke la arkaĵoj montras la talenton de artistoj. Ili surhavas belegajn reliefojn de roloj en tiamaj noveloj.

Forlasinte Qianwei, ni veturis suden laŭ la rivero. Transpasinte la kajon Xiaogu kaj Guandao-rivereton, ni alvenis al Yibin, kunfluejo de aliaj tri riveroj sur la Silka Vojo. ■



Koko-sinjoro Chen pentras.

La pramejo Qianwei

Foto de XU YE

Ĉinio ĉe prunto-redona kulmino

de DA WEI

EN la 7-a de oktobro 1989, la Ĉina Administracio de Fremdaj Valutoj unuafoje publikigis la monsumon de Ĉinio pruntitan de aliaj landoj, kiu leviĝis de 15.8 miliardoj da usonaj dolaroj en 1985 al 40 miliardoj en la fino de 1988.

En la naŭdekaj jaroj Ĉinio eniras en prunto-redonan kulminon. Ĉu Ĉinio havas kapablon kovri la eksterajn ŝuldojn? Ĉu Ĉinio falos en ŝuldan krizon? Tiuj demandoj estas ĝenerale atentataj de eksterlandaj personoj. Pri tio, lastatempe mi vizitis koncernajn respondeculojn de la Ĉina Administracio de Fremdaj Valutoj kaj la Ministerio de Eksteraj Ekonomiaj Rilatoj kaj Komerco kaj petis ilin konigi al niaj legantoj la lastan staton ĉi-flanke.

Kial Ĉinio pruntis monon de aliaj landoj? Kian rolon tio ludis en la nacia ekonomio?

Tang Gengyao, estro de la Ĉina Administracio de Fremdaj Valutoj, respondis, ke monprunto de eksterlando estas grava konsistiga parto en utiligo de alilanda kapitalo. Ĝi povas forigi la mankon de enlanda konstrua kapitalo, enkonduki avangardajn teknikojn kaj ekipaĵojn, disvolvi produktadon kaj altigi la povon de entreprenoj por gajni fremdajn valutojn.

De post 1979, kiam Ĉinio ekpraktikis la politikojn pri ekonomia reformo kaj pordmalfermo, Ĉinio fortigis sian enlandan fundamentan konstruadon kaj plibonigis sian investan medion, uti-

ligante mez- kaj longperiodajn pruntojn kun favoraj kondiĉoj donitajn de internaciaj financaj organizoj kaj aliaj registaroj. La ĉefaj konstruaj objektoj inkludis tiujn de haveno, fervojo, komunikado, energio, agrikulturo k.a., el kiuj multaj jam funkcias kaj akiris okulfrapan socian kaj ekonomian efikon. Ankaŭ iuj lokoj kaj departementoj de Ĉinio petis komercan krediton de aliaj landoj por fari teknikan reformon kaj ekipaĵnovigon de mez- kaj malgrandaj entreprenoj kun celo levi ilian produktivecon kaj pliigi ilian eksporton. Krome, Ĉinio enkondukis fremdan kapitalon ankaŭ por ekvilibrigi siajn enspezojn kaj elspezojn en la ekstera komerco, kio certgrade kovris deficiton en la ekstera komerco kaj ludis ian rolon en stabiligo de ekonomia kresko.

Pri la problemo multe zorgata de la mondo, ĉu Ĉinio kapablas redoni la eksterajn pruntojn, Tang kaj alia respondeculo diris, ke unue la prunto-redona strukturo de Ĉinio estas fundamente racia. La mallongperiodaj ŝuldoj konsistigas 18% de la totala sumo de la ŝuldoj, je 25% malpli altaj ol la monde aprobita kriterio, kaj daŭre malaltiĝas. La pruntitaj fremdaj valutoj kaj ŝuldospecoj estas variaj, kio povas redukti perdon pro ŝanĝiĝo de tarifo. Post reguligo de la malsamspecaj ŝuldoj, la Ĉina Administracio de Fremdaj Valutoj difinis la prunto-redonan tempon pli racie, kio kreis kondiĉojn kaj gajnis tempon por akumuli kapitalon.

Due, Ĉinio praktikas laŭplanan var-ekonomion, tial la monsumo pruntedonita de aliaj landoj estas rigore limigita en la repaga kapablo de la ŝtato. En la mondo oni ĝenerale prenas la prunto-redonan elcenton (la proporcio inter la jare pagita sumo por la ŝuldoj kaj interezoj kaj la jara totala sumo de eksporta enspezo kaj aliaj nekomercaj enspezoj) kaj la ŝuldan elcenton (la proporcio inter la jarfina totala ŝuldosumo kaj la samjara totala sumo de eksporta enspezo kaj aliaj nekomercaj enspezoj) kiel kriteriojn por taksii prunto-redonan kapablon de unu ŝtato. Ĝis nun, la prunto-redona elcento por Ĉinio estas ĉ. 15%, je 20% malpli alta ol la kriza linio ĝenerale akceptata en la mondo, kaj ĝia ŝulda elcento estas 90%, ĝi estas ankaŭ sur la kriza linio de 100%. Koncerna departemento antaŭdiris, ke eĉ en la alta tajdo de prunto-redono dum la naŭdekaj jaroj, la du kriterioj ne estos sub la krizaj linioj.

La supre diritaj du kriterioj montras, ke estas tre grava la enspezo de fremdaj valutoj en la eksporto kaj nekomerco, interalie la eksporta enspezo estas ĉefa. Tial, ankaŭ la eksporta stato en 1989 kaj ĝia disvolva tendenco en la venontaj jaroj estas grava bazo por antaŭvidi, ĉu Ĉinio povos glate trapasi la prunto-redonan periodon. Laŭ la plej nova statistiko de la inisterio de Eksteraj Ekonomiaj Rilatoj kaj Komerco, ĝis la jarfino de 1989 la valoro de la eksporta komerco atingis 43.28 miliardojn da usonaj dolaroj, je 6.5% pli multe ol en 1988, tiu de la

importa atingis 38.27 miliardojn da usonaj dolaroj, je 3.9% malpli multe ol en 1988. La ekstera komerco estis daŭre en favora saldo.

Influite de la politika tumulto okazinta en Pekino en junio 1989, iom reduktiĝis la rezervo de fremdaj valutoj de Ĉinio, de 17.5 miliardoj da usonaj dolaroj en 1988 al 16.3 miliardoj. Sed tiu sumo ankoraŭ superas la sumon por uzo de tri-monata importado, kio estas konforma al la internacie ĝenerala postulo por ŝtata rezervo de fremdaj valutoj. Mi informiĝis, ke Ĉinio posedas 12.7 milionojn da uncoj da oro, ankaŭ kio estas grava garantio por redono de eksteraj pruntoj.

Ĉe la sojlo de la nova jaro Zheng Tuobin, ministro de la eksteraj ekonomiaj rilatoj kaj komerco, diris en sia laborresumado: "En 1989 la ekstera komerco de Ĉinio renkontis malfacilojn pasintecce nerenkontitajn. En tiu stato nia ministerio sukcese plenumis la taskojn kaj havigis al la eksporto certan kreskon. Tio montris, ke Ĉinio havas pli fortan kapablon por trakti okazaĵojn en la eksteraj ekonomiaj rilatoj kaj komerco kaj estas solidaj la amikaj kunlaboraj rilatoj inter Ĉinio kaj alilandaj industriaj kaj komercaj rondoj."

Parolante pri la ĉi-jara ekstera komerco, Zheng emfazis, ke en la kuranta jaro ne ŝanĝiĝos la sistemo pri laŭkontrakta laboro praktikata en la eksteraj ekonomiaj rilatoj kaj komerco de Ĉinio, ne ŝanĝiĝos ankaŭ la politikoj por stimuli eksporton. La ekstera komerco estos en daŭra kaj stabila kreskado, ĉar ni havas nemalmultajn favorajn kondiĉojn. Unue, la situacio en la tuta lando estas stabila. La politikoj de Ĉinio por persisti en ekonomia reformo kaj pordmalfermo al la aliaj landoj kaj plivastigi la kunlaboron en ekstera komerco vekis eĥon en la mondo. Due, la grandskala reguligo de tarifo de *renminbi* (monunuo de Ĉinio) en la lasta jarfino faris ĝin pli konforma al la realo, tio ludos pozitivan rolon en ek-

sporto, utiligo de alilanda kapitalo kaj disvolvo de aliaj ekonomiaj kaj teknikaj kunlaboroj. Trie, post reguligo kaj reordigo pli boniĝos la enlandaj ekonomiaj medioj kaj ordo, paŝon post paŝo pli boniĝos la entreprena kaj produktaja strukturoj; la praktikata financa kaj pruntedona redukto bridos la inflacion kaj prez-altiĝon enlande. Samtempe mildiĝos la kontraŭdiroj inter la en- kaj eksterlandaj vendado de nemalmultaj varoj, kaj relative pliĝos la eksportaĵoj. La monda ekonomia situacio kaj internacia merkato en 1990 ĝenerale estos favoraj al la disvolviĝo de la ekstera komerco de Ĉinio.

"Laŭ via aserto, ĉu ni povas diri, ke Ĉinio havas memfidon en redono de la eksteraj pruntoj?"

"Jes." Tio ja estas komuna opinio de la respondeculoj de la Ministerio de Eksteraj Ekonomiaj Rilatoj kaj Komerco kaj la Ĉina Administracio de Fremdaj Valutoj. Ankaŭ koncernaj personoj de la ministerio diris, ke por garantii daŭran disvolviĝon de la eksporto, la ministerio aplikis serion da praktikeblaj rimedoj, ekz., reguligi la strukturon de importataj kaj ek-

sportataj varoj, bridi kaj redukti la eksporton de krudaĵoj, kiuj mankas ankaŭ en nia lando, aktive pliigi la eksporton de maŝinaj, elektraj, prilaboritaj kaj altteknikaj produktaĵoj kaj aliaj industriaĵoj, daŭre akceli la eksporton de agrikulturaj produktaĵoj, ĉiamaniere pliigi enspezon de fremdaj valutoj, ekspluati enlandan latentan forton, ŝpari diversajn elspezojn, daŭre pli boniĝi la investan medion, perfektigi ekonomiajn regulojn koncerne aliajn landojn, pli boniĝi koncernan servon, paŝon post paŝo krei medion, en kiu alilandaj komercistoj faros entreprenadon laŭ internaciaj konvencioj.

Koncerna oficisto de la Ĉina Administracio de Fremdaj Valutoj diris, ke Ĉinio ĉerpos lecionojn de iuj disvolviĝantaj landoj pri prunto-redona krizo por preventi eventualaĵojn, plene utiligos reguligajn makrorimedojn de la ŝtato por rigore trakti la eksterajn ŝuldojn, pluaparte perfektigos la registran, statistikan kaj kontrolan sistemon de eksteraj ŝuldoj, por ke la mono plene ludu rolon en la nacia ekonomia konstruado, novaj pruntoj venu daŭre kaj redono de pruntoj estu farata glate. ■

Horaro de la ĉiutaga Esperanta disaŭdigo de Radio Pekino

UTC	Al regionoj	Ondoj (m)	KHz
20:00-20:30	Eŭropo	40.1	7470
		31.5	9500
		30.1	9965
22:30-23:00	Latin-Ameriko	31.6	9480
		26	11515
11:00-11:30	Japanio, Koreio	31.6	9480
		43.1	6955
13:00-13:30	Sudorienta Azio	25.7	11650
		19.7	15165

Cao Xueqin kaj Lia Romano “Songô en la Ruĝa Buduaro”

de MEI ZHI

“**S**ongô en la Ruĝa Buduaro” estas la plej eminenta verko el la ĉinaj klasikaj romanoj. Ĝia aŭtoro Cao Xueqin (Caŭ Ŝjueĉin, 1715?-1764?) estis granda realisma verkisto de Ĉinio. Li naskiĝis en aŭtoritata nobela familio. Lia avo kreis la familian prosperon. La imperiestro inspektis la sudan parton de la lando 6-foje kaj 5-foje prenis lian hejmon kiel sian provizoran loĝejon. Tio montris la eksterordinaran aŭtoritatecon de la familio de Cao kaj kian intiman rilaton ĝi havis kun la imperiestro. Poste la patro de Cao Xueqin estis implikita en konflikto interne de la imperiestraj familianoj kaj eksigita de la ofico, sekve de tio liaj familiaj proprietaĵoj estis konfiskitaj kaj dekadenciĝis la familio. Post tio lia familio suferis pli grandan malfeliĉon kaj komplete bankrotis.

Cao Xueqin travivis la prosperon kaj dekadencan de la familio. Li vivis lukse en la junaj jaroj. Kiam li plenkreskis, la familio dekadenciĝis. En siaj lastaj jaroj li loĝis en la okcidenta antaŭurbo de Pekino. La vivo estis tiel mizera, ke la tuta familio manĝis nur kaĉon kaj li ofte aĉetis vinon kredite. Tiu travivaĵo sendube metis bonan bazon por lia verkado en la estonteco.

La romano estis verkita de Cao Xueqin en la mizeraj jaroj de lia vivo. Li verkis ĝin 10-jare kaj poluris 5-foje. Bedaŭrinde, antaŭ ol li finis la verkon, li forpasis en la aĝo de malpli ol 50 jaroj en mizero, malsaniĝinte de granda ĉagreno pro morto de lia juna filo.

Komence la romano nomiĝis “Historio de la Ŝtono” el 80 ĉapitroj. Tuj ĉe sia apero en la formo de mankopio kaj ekcirkulo en la socio, ĝi fariĝis tre ŝatata de la publiko. Poste alia verkisto Gao E daŭrigis la aferon de Cao Xueqin kaj verkis la postajn 40 ĉapitrojn, kiuj kun la

originalo de Cao kune eldoniĝis tipografie. De tiam la romano cirkulis en la tuta Ĉinio. Oni legis kaj preparolis ĝin kun granda intereso. Tiam estis la onidiro “Estas vane tralegi ĉiujn klasikajojn, se babilas oni ne ekde ‘Songô en la Ruĝa Buduaro’”. Multaj personoj sinsekve



Portreto de Cao Xueqin

verkis por ĝi postajn ĉapitrojn, kio eĉ rompis la rekordon de daŭrigitaj ĉapitroj al unu romano. La romano vekis la onian intereson pri esplorado kaj naskiĝis nova fako *Hongxue* (Hongŝjue), studo pri "Songo en la Ruĝa Buduaro". Tio montris ĝian grandan kaj vastan influon.

Antaŭ "Songo en la Ruĝa Buduaro" en Ĉinio ne estis romano kun tiel riĉa enhavo, kompleta strukturo, komplikaj intrigoj kaj majesta imponeco, tial ĝi estis rigardata kiel enciklopedio de la ĉina feŭda socio.

Kun tragikaj amo kaj geedziĝo inter la nobelaj gejunuloj Jia Baoyu (Ĝja Baŭju), Lin Daiyu kaj Xue Baochai (Ŝjue Baŭĉaj) kiel la ĉefa fadeno, la romano montris la prosperon kaj dekadencan de la kvar grandaj feŭdaj familioj Jia, Wang, Shi kaj Xue. Kun la familio de Jia kiel la centro, la romano montris la procezon de prospero kaj dekadenco de la nobelaj familioj.

La heroo Jia Baoyu estis ribelanto de la feŭda nobela familio. Jam de lia naskiĝo, la familio aranĝis por li vivovoĵon de lernado, oficistiĝo, riĉiĝo kaj glorigo de la prapatroj. La patro admonis lin ĉiam per tre rigoraj feŭdismaj etiketoj. Sed la avino dorlotis kaj protektis lin kaj li vivis ĉiam inter la knabinoj. La de li loĝata Daguanyuan estis ĝardeneska konstruaĵaro, en kiu loĝis liaj fratinoj kaj multaj junaj servistinoj. Ĝi estis vera "lando de virinoj". Ĉiutage vivante inter la knabinoj, li fariĝis virineska, kaj formiĝis lia ribela karaktero, sub la influo de la bonkoraj knabinoj. Li abomenis internan batalon kaj diboĉan vivon de la familio kaj profunde kompatis la junajn servistinojn pro ilia mizera sorto. Li malŝatis la vivovoĵon pretigitan de la familio kaj ŝtatoficistiĝon. Li sentis tian traktadon malagrable kaj riproĉis tion. Lia amo al Lin Daiyu pliiĝis lian ribelecon.

Lin Daiyu naskiĝis en klerula familio de markizo kaj estis kaprica pro dorlotado de la gepatroj en ŝia infaneco. Ŝiaj gepatroj mortis frue, tial ŝi vivis portempe en Jia-familio. Ŝi orfa kaj aroganta vivis

tamen en alies familio. Tio faris ŝin sentimentalaj kaj suspektema. Ŝi timis, ke oni malestimas kaj malŝatas ŝin. En tia medio ŝi ofte diris pikajn vortojn por memdefendo, sed samtempe ŝi ofte suspiris kaj sin kompatis. Ŝi estis afliktiĝema je vido de iuj okazaĵoj. Prospero kaj viglado en Daguanyuan, alies ridoj kaj teneraj kondutoj, eĉ aŭtuna vento, nokta pluvo, florfalo kaj neĝado estigis ĉe ŝi senlimajn aflikton kaj malĝojon. Ĉar ŝi malestimis trivialecon de la feŭdaj literaturistoj kaj malaprobis la malbonan ŝtat-oficistigon en la ekzameno de verkado de stereotipaj artikoloj, tial ŝi fariĝis sola amikino de Jia Baoyu. Ŝi kaj Jia Baoyu kunestis jam de la infaneco. La sincera amo de Baoyu fariĝis ŝia spirita subtenilo en la vivo.

Tamen la libera amo ne povis sukcesi en la feŭda nobela familio. La amo inter Jia Baoyu kaj Lin Daiyu ne nur ne estis aprobita de la feŭdaj gepatroj, sed male, ili estis disigitaj. Ĉar ilia amo kun klara ribeleco ne estis tiu inter talentulo kaj belulino, sed baziĝis sur komuna malamo al la feŭdisma vivovoĵo, tial ju pli fortiĝis ilia amo, des pli akriĝis la kontraŭdiro inter ilia amo kaj la feŭdaj fortoj. Pro tio, en la decida momento por elekti edzinon por Jia Baoyu, la patriarko de Jia-familio ekskluzivis Lin Daiyu, kies karaktero, en la okuloj de la patriarko, ne konformis al la feŭdisma kriterio por virinoj, kaj prenis Xue Baochai, kuzinon de Jia Baoyu, kiel lian edzinon.

Xue Baochai devenis de la familio de kortega komercisto, kiu estis tiel riĉa, ke ĝi rigardis perlojn kiel teron kaj oron kiel feron. Ŝi estis tipa virtulino laŭ la feŭdisma kriterio. Supraĵe ŝi estis silentema, diskreta kaj afabla, sed fakte pripensema, tial ŝi plaĉis al ĉiuj en la familio de Jia, eĉ la dubema onkklino Zhao laŭdis, ke ŝi estas malavara kaj bonkonduta. Ankaŭ tiu nobela fraŭlino kun forta feŭdisma konscio amis Jia Baoyu, kiu siaflanke iam korinklinis al ŝi. Ĉar ŝi foje-foje admonis Jia Baoyu lerni artifikon en la socia interkomuni-

kigo kaj oficista vivo por la alta rango kaj riĉo en la estonteco, sed rezulte de tio, li turnis sin komplete al Lin Daiyu. Sed Baochai, multe ŝatata de la patriarko de la familio, fine fariĝis edzino de Jia Baoyu.

Kiam la grave malsana Lin Daiyu informiĝis, ke Xue Baochai edziniĝos al Jia Baoyu, ŝi en sango-sputado forbruligis siajn manuskriptojn de poemoj saturitaj de profunda amo al Jia kaj mortis de indigno. Kiam Jia Baoyu rimarkis, ke lia edzino estas Baochai, sed ne Daiyu, li falis kvazaŭ en abismon. Fine li forlasis de kolero la familion kaj bonziĝis.

Pere de la amtragedio, la prospero kaj malprospero de la granda nobela familio, la romano "Songo en la Ruĝa Buduaro" spegulis multajn sociajn aferojn, malkaŝis la luksan kaj diboĉan vivon de la feŭda regantaro kaj ĝiajn malnoblajn kondutojn kaj ĉiam pli akrajn kaj komplikajn kontraŭdirojn kaj konfliktojn. Sekve de tio la verko sentigis al la legantoj, ke estas neevitebla la pereado de la granda nobela familio kaj la feŭda socio, al kiu ĝi alkroĉiĝis. Pro tio oni nomas "Songo en la Ruĝa Buduaro" elegio por la feŭda socio de Ĉinio.

La duka domo Rongguo (Ĵongĝuo), loĝata de malmultaj feŭdaj mastroj kaj centoj da servistoj kaj plena de multvaloraj luksaĵoj, okupis duonstraton. La granda familio vivtenis sin ĉefe per terrenta ekspluatado. Sed, kiam estis tute elvringitaj la sango kaj ŝvito de la terluantaj kamparanoj, kiuj ne povis kontentigi la prodigemon de la mastroj, tiu familio do eklombardis siajn havaĵojn por daŭrigi la luksan vivon. La aŭtoro diris pere de heroo en la romano, ke la familio "ankoraŭ tenas sian aspekton ekstere, sed tute malpleniĝis la internaĵo". Ĝi similis al la "paca" kaj "prospera" socio pene ornamita de la tiama feŭda regantaro, kiu efektive estis tute putriĝinta kaj kies leĝo-sistemo, moraloj, nocioj pli kaj pli montris sian malraciecon kaj en ĝi fermentis baldaŭa krizo.

La romano vaste malkaŝis ankaŭ diversajn nigrajn fenomenojn de la

feŭda socio, rekte aŭ nerekte rilatantaj al la nobela familio. Ekz., kaŭzinte al senkulpaj popolanoj morton kaj bankroton, la feŭdaj ŝtatoficistoj, membroj de Jia-familio kaj iliaj parencoj sin montris nenion-farintaj; viroj de la familio vivis diboĉe; ĝia knabino Jia Yuanchun estis elektita kiel imperiestra kromedzino, en ŝia koro evidente kaŝiĝis malfacile detenebla malĝojo, sed ŝi devigite ŝajnis sin ĝoja antaŭ aliaj. Ĉi tie la aŭtoro direktis sian kritikan plumon al la supera feŭda regantaro.

La arta sukceso de "Songo en la Ruĝa Buduaro" estas senprecedenca. La aŭtoro kreis multajn vivverajn personojn, kiaj Jia Baoyu, Lin Daiyu, Xue Baochai, Wang Xifeng (Ŭang Ŝjifeng), Qingwen (Ĉingŭen), Xiren (Ŝjiĝen), Tria Fratino You, centojn da figuroj entute kun infektaj artaj fortoj. La aŭtoro reliefe bildigis nombron da virinaj figuroj. Malgraŭ ke ili estas similaj unu al alia en la aĝo, vivmedio kaj vivmaniero, sed ili havas ĉiu sian propran individuecon. Estas vere admirinda la arta kreiveco de la aŭtoro. Qingwen estis nature malcedema, juna servistino, kiu kuraĝis koleri kaj insulti. Foje, kiam la mastrino traserĉis Daguanyuan, Xiren kaj aliaj junaj servistinoj timigitaj estis obeemaj antaŭ la koleranta mastrino, sed Qingwen "entrudiĝis, malfermis sian koston 'Pum!' Ŝi ŝutis ĉiujn objektojn surteren, per la du manoj tenante ĝian fundon". Ŝia konduto klare reliefigis ŝian karakteron. Ankaŭ Yuanyang estis obeema servoknabino, sed kiam la mastro intencis preni ŝin kiel sian kromedzinon kaj minacis ŝin, ŝi tuj fariĝis nefleksebla. Antaŭ Jia Mu kaj aliaj ŝi ĵuris: "Mi jam faris decidon, ke mi ne edziniĝos dum la tuta vivo. Eĉ se via sinjorina moŝto devigos min, mi ne obeos antaŭ mia morto!" Ŝiaj vortoj montris ŝian malestimon al la "ŝato" de la mastro.

Ĉiu intrigo, ĉiu persono kaj ĉiu frazo en la romano estas senĝenaj kaj montris la neordinaran signifon de la ordinara vivo. Ekz., prezentante la viziton de Avino Liu, mal-



Daiyu enterigas florojn.

riĉa parenco el kamparo, al la ĝardeno Daguanyuan, la aŭtoro detale priskribis la manĝadon, trinkadon kaj luksan vivon de Jia-familio, pro kiuj Avino Liu kun miro diris: "La mono por unu manĝo sufiĉas por unujara elspezo de ni, kamparanoj." Priskribante ordinaran vivon la aŭtoro per fluaj vortoj vidigis grandajn aferojn kaj konfliktojn. Ekz., traserĉi Daguanyuan estis unu el la brile priskribitaj ĉapitroj.

La lingva sukceso de la romano superis tiun de ĉiuj romanoj aperintaj antaŭ ĝi. Tio vidigis ĉefe en ĝiaj lakoneco, senafekto kaj riĉa esprimo. Ĝiaj dialogoj estas multaj, longaj aŭ mallongaj, elegantaj aŭ trivialaj, ĉiuj konformas al la karaktero de la heroo. Ekz., kiam Lin

Daiyu ĵus venis al Jia-familio, en la romano unufoje aperis Wang Xifeng, bofratino de Jia Baoyu, legiĝas jena priskribo: "Apenaŭ finiĝis la parolo, aŭdiĝis rido el la korto: 'Mi malfruis kaj ne povis bonvenigi malproksiman gastinon!'" La vortoj vivece bildigis ŝian rapideman, decideman kaj kapablan karakteron, kio tre konformas al la pozicio de ŝi — administranto pri mastrumaj aferoj de la familio.

"Songo en la Ruĝa Buduaro" levigis la klasikan literaturon de Ĉinio al senprecedence alta nivelo. Kompreneble, ĝi havas sian limigitecon, kiu esprimas sin ĉefe en ĝiaj fatalismo kaj pesimismo. Malgraŭ tio ĝiaj atingoj estas senprecedencaj. Post ĝi la ĉina literaturo eniris en la lastatempan historion. ■

Pri la Ĉina Esperanto-Turisma Simpozio

DE la 20-a ĝis 22-a de decembro, 1989 okazis en la antikva urbo Xi'an (Ŝji'an) Esperanto-turisma simpozio iniciatita de la Paca Esperanto-Turisma Centro (PETC). Ĝin ĉeestis 52 reprezentantoj de turismaj servoj kaj respondeculoj de Esperanto-asocioj el 12 provincoj kaj municipoj de la tuta Ĉinio. Ankaŭ la Ĉina Esperanto-Ligo kaj la redakcio de El Popola Ĉinio sendis siajn reprezentantojn al la simpozio.

En la simpozio la direktoro de PETC Gong Peikang faris paroladon pri "Turismo kaj Esperanto"; Wang Tianyi (Ŭang Tjanji), la ĝenerala sekretario de la Xi'an-a Esperanto-Asocio, prelegis pri la Esperanto-turismaj organizaĵoj kaj la aktuala stato en kaj eksterlandaj; Wang Minhao (Ŭang Minhaŭ), la ĝenerala sekretario de la Ŝan-

haja Esperanto-Asocio, konigis sian sperton en organizado de esperantistaj turistoj; kaj Zhu Huabao (Ĝu Hŭabaŭ), direktoro de la Esperanto-Turisma Sekcio de la Pekina Tian'an-a Turisma Servo, informis la ĉeestantojn pri la 15-a Internacia Foiro de Esperanto-Turismo okazigita en septembro 1989, en Bydgoszcz, Pollando.

La diskutado iris en du grupoj. Ili interŝanĝis spertojn de la peresperanta turismo kaj havigis al si novan konon pri ĝia graveco, ke kombini Esperanton kun turismo estas grava rimedo por antaŭenpuŝi Esperanto-movadon. Tio ne nur plifortigos kontakton inter la diverslandaj esperantistoj, precipe la kontakton kaj amikecon inter ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj, sed ankaŭ disvastigos aplikadon de Esperanto en multaj kampoj kaj akcelos plian disvolvi-

ĝon de la ĉina Esperanto-movado. Samtempe tio donos al eksterlandaj esperantistoj la bonan ŝancon pli bone koni Ĉinion. Konsiderante, ke la plejparto el la esperantistaj turistoj estas ekonomie nerika, la ĉeestantoj proponis doni al ili favorajn kondiĉojn en turismo-servo. Ili opiniis, ke la ŝlosilo de la peresperanta turismo estas bona kunlaboro inter Esperanto-organizaĵoj kaj lokaj turismaj servoj kaj elbako de kapablaj Esperanto-ĉiĉeronoj.

Iuj personoj proponis fondi Esperanto-turisman reton en Ĉinio kun PETC kiel la kerno, kiu nomiĝas "Pactur". La reprezentantoj el kvin urboj tuj esprimis sian volon aliĝi al la reto. Ili esperas, ke la "Pactur" disvolviĝos kaj fariĝos la reto tra la tuta lando.

La simpozio elmetis proponojn pri turismo en 1990, kiel esperantista esplorgupo pri la ĉina Esperanto-literaturo, vizitgrupo laŭ la spuroj de Verda Majo, esplorgupon pri la Esperanto-instruado kaj vizitgrupon de legantoj en la 40-jara Jubileo de EPC.

La PETC estas fako de la Ĉina Paca Internacia Turisma Kompanio kaj fondiĝis en aŭgusto de 1989 en Pekino. ■



Sur la podio de la simpozio

BELA REMEMORO

de **BODIL** kaj **GUSTAV KÜHLMANN** (Danlando)

Ni jam ricevis 18 artikolojn por la rubriko "Mi kaj Ĉinio". De la aprila numero ni publikigas iujn el la kontribuoj. La rezulto de la aljuĝo aperos en la junia numero.

— **La Red.**

Ni ambaŭ lernis Esperanton en la jaro 1937, jam tre frue renkontis en esperantistaj rondoj informojn pri Ĉinio. Tio okazis pere de informiloj kaj gazetoj, eĉ serioj da poŝtkartoj, kiuj rakontas pri teruraj bataloj kontraŭ japana invado. Multajn el tiuj gazetoj kaj poŝtkartoj mi ankoraŭ havas.

Dum la terura mondmilita periodo ankaŭ nia lando estis sub la jugo de milita regado, sed feliĉe por la mondo, ke tiu tempo trovis sian finon.

Denove internaciaj kontaktoj establiĝis, Esperantaj periodaĵoj komencis aperi kaj atingis mian hejmon. La 1-an de majo 1950 —

ho, kia tago — aperis la unua numero de El Popola Ĉinio, mi vere entuziasmiĝis, jen fine gazeto de alia flanko de la terglobo, kiu raportas pri la okazintaĵoj en tiu flanko de la mondo. Avide mi legis ĉion, kaj ekde tiu 1-a numero mi ĉiam renovigis mian abonon, kaj daŭre abonas. (Ĉiuj numeroj de EPC ekde la 1-a ĝis hodiaŭ nun troviĝas en la Reĝa Biblioteko de Danlando, ĉar mi donacis la gazeton al la biblioteko.)

En 1956 UEA okazigis la 41-an Universalan Kongreson en Kopenhago. Ni sendis inviton al ĉiuj ambasadoj en Kopenhago ĉeesti la kongreson. Venis el la ĉina ambasado du personoj por esplori, kia estas tia kongreso, kaj ĉu ĝi estas partoprenenda por ĉinoj. Ho, Kia ĝojo, la ambasado donis verdan lumon por la tri-persona delegitaro partopreni la kongreson. Venis s-ro Ye Laishi, Chen Yuan kaj Zhang

Qicheng.

Post la kongreso ili estis gastoj ĉe lunĉo en nia hejmo. Kaj poste en la konstitucia tago de Ĉinio la ĉina ambasado en Kopenhago invitis mian edzinon kaj min partopreni celebradon de la festo en la ambasado. Pasis la jaroj, dum pluraj kongresoj ni renkontis niajn ĉinajn amikojn.

En 1985-jaro de brilo kaj ĝojo oni anoncis en Augsburg, ke venontjare la 71-a U.K. okazos en Beijing.

Per intensa ŝparado sukcesis al nia tuta familio, mia edzino, nia filino — denaska esperantistino — ŝia filo kaj mi mem per la rusa flugkompanio iri al Beijing. Tiu vojaĝo estas la kulmino de nia vivo, vere bonorganizitan kaj ĉerman kongreson ni travivis kaj la ekskursojn tre interesajn. Stari sur la granda placo, promeni en la malpermesita urbo, grimpi sur la Grandan Muron, viziti la Someran Palacon, kulmino de ĉio estas la akcepta bankedo en la Popola Halo — kaj ĉie homoj ridetantaj kaj helpemaj, ne nur inter la ĉinaj esperantistoj kaj organizantoj, sed ankaŭ inter la ordinaraj homoj sur la stratoj. Plej bonan impreson pri tiu regno kaj ĝia popolo ni hejmen portis en niaj memoroj.

Ni reflugis al Danlando pere de ĉina aerkompanio kaj ĝi estas por ni la ĝis nun plej afabla aerkompanio kun kiu ni flugis, kaj fakte ni jam uzis dudekon da naciaj fluglinioj.

Post la reveno de la kongreso ni faris albumon pri la tuta vojaĝo, kaj ofte foliumante la albumon ni revas malantaŭen al feliĉaj kaj sunplenaj travivaĵoj en via bela ĉefurbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. ■

S-ino Bodil Kühlmann (meze) kaj s-ro Gustav Kühlmann (dekstre)



Kapablo

Funelo malfermas sian buŝon kaj englutas akvon kiel eble plej multe. Botelo silente staras mal-supre kaj akceptas ĉiun guton el-lasitan de ĝi.

La funelo demandas la botelon: "Kiom da akvo vi povas enteni?"

La lasta respondas: "Botelon da akvo."

La funelo ekridegis, dirante: "Kiel povra vi estas! Mi havas la kapablon engluti tiom, kiom da akvo estas."

"Mi volas vian fingron"

Dio venis al la homa mondo por trovi malavarulon kaj lin diigi. Li el-sorĉis oron el ŝtono kaj tiel ekzamenis la homojn, sed li mal-sukcesis.

Fine li renkontis iun homon. Montrante malgrandan ŝtonon, la dio diris al li: "Mi elsorĉu el la ŝtono oron kaj donacu al vi, ĉu bone?" La homo kapneis. La dio pensis, ke li eble ne volas akcepti ĝin pro ĝia malgrandeco. Do li diris, montrante grandan ŝtonon: "Mi ŝanĝu ĝin en oron por vi, ĉu bone?" La homo denove kapneis.



"Li ja estas malavara. Kia nobla homo! Mi lin diigos," pensis la dio kaj demandis: "Vi ne volas oron. Kion do vi deziras?" La homo prezentis sian fingron kaj diris: "Mi volas nenion alian, krom via fingro, kiu povas elsorĉi el ŝtono oron. Kiam mi havos vian fingron anstataŭ la mia, mi havos neelĉerpeblan oron." ■

KORESPONDI DEZIRAS

* Kondel Jozef, 25-j., dez. kor. tm. pri diversaj temoj. Adr.: ul. Partizanov 136/29, 958 01 Partizanske, Ĉeĥoslovakio.

* Dez. kor. kun tutmondaj esp-istoj, kolektantaj bk., pk. Adr.: Spinochi Mihai, Cart, Florilòr, Bloc 22 k. c Ap. 42, 4200 Gheorgheni, Jud. Harghita, Rumanio.

* Novajn poŝtmarkojn sole al la unuaj 100 gepartoprenantoj mi sendas senpage, nur se vi sendas al mi unu internacian respond-kuponon. Skribu al: Fulvio Scarpa, Fondo Versace 3 Tr. N. 24, 89100 Reggio Calabria, Italio.

* Mi serĉas verajn kaj sincerajn leteramikojn tm., interesiĝas pri turismo, filmo, akvario, historio, antikvaĵoj, legendoj, kutimoj, moroj k.a. Adr.: Zbigniew Siekierski, PL 26-600 Radom, ul. Sadkowska 13 m.8., Pollando.

* Suĥockij S., 35-j. inĝeniero-konstruisto, dez. kor. kun orientlandanoj pri ĉt. Adr.: 246045, Gommel, Sviridova 35-15, Sovetunio.

* 26-j. flegistino dez. trovi geamikojn, interesiĝas pri medicino, sporto, interŝ. bk. kaj pm. Adr.: Svetlana Kuĉic, SU-224000 Brest,

Str. Vorovskogo, 11-1. Sovetunio.

* 14-j. lernanto interesiĝas pri sporto, vojaĝoj, interŝ. pm. kaj bk., kaj Esperantaĵojn, reciproke gastigadi. Adr.: Sergej Jaroŝeviĉ., Str. Naganov, 22-8., SU-224005-Brest, Sovetunio.

* Okaze de la dumiljariĝo de nia urbo Speyer bonvolu sendi al ni salutokarton! Esperantogrupo, Nikolaus-von-Weis-Gymnasium, Vinzentiusstr. 1, D-6720 Speyer, FR Germanio.

* Yazdan Ebrahimy dez. kor. tm. Adr.: P.O.Box 444, Ghaemshahr-47615, Iran.

* Mi serĉas afablajn homojn, kiuj interesiĝas same kiel mi pri papereltondaĵoj kaj mem faras bildmotivojn. Bonvolu skribi en Esperanto al s-ino Rita Bloom, Am Kirchengsiek 29, D-3370 Seesen, FR Germanio.

* 14-j. lernantino dez. kor. tm., interesiĝas pri pm., kalendaretoj, bk. kaj glumarkoj. Adr.: Ĉese Butrimaviĉiute, Str. Gelvonu 3-47, 232010 Vilnius, Litovio, Sovetunio.

* S-ro Chen Liming volas kor. kun esp-istoj tutmonde pri pm. bk. vivo ktp. Adr.: Niu Nai Gong Si Di Yi Mu Chang, Ningbo, Zhejiang, Ĉin-

io 315020.

* Yu Ximei, 24-j. s-ino, dez. kor. pri ĉt. Adr.: Yu Zhou Ci Chang, Jingdezhen, Jiangxi, Ĉinio.

* Anoj de Yiyang-a Esperanto-Lerngrupo dez. kor. tm. pri ĉt. Adr.: Pu Aichun, Gansi-Gongduan-Ding-Ban, Fangsha-1-Fenchang, Yiyang-Mafangchang, 413002-Yiyang, Hunan, Ĉinio.

* 20-j. fraŭlo dez. kor. kun geesp-istoj tm. pri fotografado kaj muziko. Adr.: Fang Ying, Fangsha-1-Fenchang-Bing-Ban, Yiyang-Mafangchang, 413002-Yiyang, Hunan, Ĉinio.

* 23-j. fraŭlo dez. kor. kun geesp-istoj tm. pri filatelo. Adr.: Zhang Libo, Leng-Zuo-Che-Jian, Yiyang-Hua-Gong-Ji-Xie-Chang, 413000-Yiyang, Hunan, Ĉinio.

* 21-j. fraŭlo dez. kor. kun geesp-istoj tm. pri filatelo, fotografado kaj interŝ. spertojn en lernado. Adr.: Fu Haizhong, Yiyang-Tao-Hua-Lun-Bo-Huo-Shang-Dian, 413000-Yiyang, Hunan, Ĉinio.

* 22-j. fraŭlo dez. kor. kun geesp-istoj tm. pri literaturo, poezio kaj muziko. Adr.: Zhang Jian, Yiyang-Liang-Shi-Ju, Di-2-Liangshi-Cangku, 413000-Yiyang, Hunan, Ĉinio.

ESP-NOVAĴOJ

● Rekomendite de la Konstanta Konsilantaro de la Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL), Chunchan Yeh kaj Liu Ling estis elektitaj antaŭ nelonge kiel komitatanoj de UEA.


● Invitite de ĈEL, la trimembra Japana-Ĉina Amikeca E-delegacio de Shizuoka kun s-ro Tokuda Rokuro kiel estro vizitis Pekinon, Hangzhou kaj Ŝanhajon de la 3-a ĝis la 10-a de decembro, 1989. Dum la vizitado, Liu De-you, kultura vicministro, Bakin kaj Ĵelezo, honoraj prezidantoj de ĈEL, intervidiĝis kun s-ro Tokuda Rokuro. La gastoj ĉeestis la kunsidojn okazigitajn de ĈEL, la redakcio de "El Popola Ĉinio" (EPC), la Ĉina E-Eldonejo, la E-sekcioj de Radio Pekino kaj de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio kaj interalie vizitis la oficejon de la redakcio de EPC kaj la studion de Radio Pekino.

● Meze de decembro, 1989, la eksprezidanto de Akademio de Esperanto, fama brita verkisto kaj poeto en Esperanto William Auld kaj lia edzino vizitis Pekinon kaj estis varme bonvenigitaj de ĈEL, la redakcio de EPC, E-sekcio de Radio Pekino kaj la Pekina E-Asocio. La gastoj kaj gastigan-

toj interŝanĝis la opiniojn pri la situacio de E-movado. La gastoj respondis demandojn de pekinaj esperantistoj pri la perspektivo de Esperanto k.a.

● De post sia fondiĝo en julio 1989, la E-Turisma Sekcio de la Pekina Tian'an-a Turisma Servo aktive kontaktiĝas kun en- kaj eksterlandaj E-organizoj. Lastatempe, ĝi kaj la redakcio de EPC interkonsentis kune organizi legantojn de EPC kaj aliajn eksterlandajn esperantistojn vojaĝi en Ĉinio. Krom en- kaj eksterlandaj turismaj grupoj kaj individuoj la turisma servo ankaŭ akceptas diversfakajn rondojn, konferencojn kaj turistojn kun aparta itinero kaj donas al ili diversajn servojn, kiaj kultura kaj teknika interŝanĝo, vizito k.a. Ĝi servas al turistoj ankaŭ per kuracado kaj lernigo de uŝuo, ĉigongo, masaĝo kaj akupunkturo. La turisma servo donas al esperantist-turistoj 10-20% da rabato. Interesatoj bv. turni al s-ro Zhu Baohua, N-ro 8 Dongzhimen Nandajie, CN-100027, Pekino, Ĉinio. Tel 485821 Tlx 210472 TATS CN

E La 20-an de decembro, 1989, s-ro Cen Qixiang, fama ĉina teoria lingvisto kaj edukisto, forpasis en sia aĝo de 86 jaroj. S-ro Cen aktive propagandis kaj uzis Esperanton kaj estis iama membro de la kon-



Ges-roj Auld (la unua kaj dua de dekstre) kaj laborantoj de EPC-redakcio

silantaro de ĈEL.

● La 15-an de decembro, 1989, la poŝtoj de Pekino, Lhasa, Changsha, Ningbo, Qingdao, Nanchang, Changshu kaj aliaj 13 urboj faris Esperanta-ĉinajn stampojn kaj iuj el ili emisiis Esperantajn memor-kovertojn, memore al la 130-a datreveno de la naskiĝtago de Zamenhof.

Por memori la 50-an datrevenon de la skribo de la vortoj de Mao Zedong por la Esperanta Ekspozicio en Yan'an, la poŝto de Changshu faris Esperantan stampojn en la 9-a de decembro, 1989.

● Post longa preparo la Esperanto-fako de la Budapeŝta Universitato Eötvös ĝoje raportas, ke ĝi rajtas oferti internacian korrespondan interlingvistikan kurson tute en Esperanto. Se estos sufiĉe da aliĝintoj, ĝi komenciĝos en septembro 1990. La 3-jara kursaro kondukos al ŝtata rekonata diplomo.

● Voljskija Esperanto-Klubo "Samideanoj", Esperanto-sekcio de Turisma Firmao "ORBITA" kore invitas vin partopreni la III-an Internaci-Tutsovetian Festivalon de Esperanto-Arto, kiu okazos en Voljskijo, la 2-9-an de majo, 1990. La nombro de partoprenantoj ne estas limigita. La Festivalo estos la plej granda Esperanto-evento por USSR post la jaro 1926 kaj ĝin partoprenos reprezentantoj de USSR TV, centra kaj loka gazetaro, Volgograda TV kaj Radio.

● En aŭtuno de 1989, en la elementa lernejo Parkway, Clarkston, Washington, la lernantoj elektis la lingvon "Esperanto".

S-ro Bakin (la unua de maldekstre) intervidiĝas kun s-ro Tokuda Rokuro (la dua de dekstre).




Tricikloj en Pekino


Fotoj de LI SONGSHAN kaj LI CHUNGENG



Antaŭ varvagonaro

Manĝaĵbudoj





Stando


Triciklo estas trafikilo movata per homa forto kaj uzata ĉie en la ĉinaj urboj kaj vilaĝoj. Ĝi ne bruas, nek ellasas gason. Ĝenerale, ĝi estas uzata por transporti varojn kaj veturigi homojn, kaj por ambaŭ uzoj samtempe. Malgranda, ĝi povas veturi kaj sur zigzaga vojo kaj en strateto.

Tiaj tricikloj iras ĉie en Pekino. Kaj krome, nemalmultaj etvendistoj uzas ilin kiel budojn por faciligi la vendon.

Turistoj en triciklo



Atendo





"Alvoko" (Ksilografajo) de DONG KEJUN

WEI LIAO:

Pentristaro de Guizhou Strebanta al Lokaj Gustoj

ONI ŝatas tiel priskribi la teron de Guizhou (Gujōu)-provinco, ke tie ne troviĝas ebena spaco pli granda ol tri metroj. Ŝajne la Guizhou-anoj havas la krudan karakteron de montanoj. En la belartista rondo de Guizhou troviĝas viglaj kaj kreivaj homoj, kiuj estas admirataj pro siaj freŝaj karakteroj kaj la interesaj lokaj kulturoj.

Kun la montana karaktero kaj memfido, ili eliris el la montaroj kaj skuis la belartan rondon de Ĉinio. En la lastaj tri jaroj jam dek belartistoj el Guizhou ekspoziciis siajn verkojn en la Ĉina Belarta Domo en Pekino.

Kio akcelis la okulfrapan prosperiĝon de la belarta rondo de Guizhou?

En Guizhou loĝas multaj naciecoj. Pro longtempa izoliteco tie konserviĝas multaj primitivaj kulturoj. La belartistoj de Guizhou, ĉu indiĝenaj, ĉu transloĝiĝintaj, ĉiuj memkonscie suĉas nutraĵojn el la tero sub la piedoj. En la 50-aj jaroj la belarta rondo de la provinco komencis sisteme prifosi, kolekti kaj klasifiki la riĉfontojn de la popolaj artoj de la nacimalplimultoj, kaj la penado daŭris 40 jarojn. La popolaj moroj en la montaroj

kaj valoj, la misteraj objektoj sur la altebenaĵo, senescepte inspiris la artistojn al verkado. La vaksaj tinkturaĵoj, arĝentaj ornamaĵoj kaj teatraj maskoj de mjaŭ-nacieco, la fajencaĵoj kaj lignaj kuleregoj de montanoj, la tamburaj turoj de dong-nacieco, la muziko, naciecaj kostumoj... ĉiuj povas esti trovitaj en la verkoj de la artistoj. Kaj eĉ herboj kaj arboj en la primitiva arbaro fariĝis fonto de inspiro de la artistoj en verkado.

Inter multaj pentristoj de Guizhou ksilografo Dong Kejun (Dong Keĝjun) estas tre interesa persono. Sed tion ne kaŭzis liaj multaj titoloj, ekzemple konsilanto de la Ĉina Belartista Asocio, konstanta konsilanto de la Ĉina Ksilografa Ligo, vicprezidanto de la Belartista Asocio de Guizhou-provinco... nek ke lia nomo estis enskribita en la "Nomaron de mondfamuloj" eldonitan de la brita eldonejo Eŭropo. Li altiris la publikon per siaj verkoj plenaj de arda entuziasmo.

Dong Kejun bone konas kaj amas Guizhou-altebenaĵon, kie li vivas kaj kreas verkaĵojn. En la popolaj kutimoj kaj moroj kun primitiva krudeco estiĝintaj kaj konservataj sur tiu tero, li vidis ian

primitivecon de la homaro, ian vivo-ekzistan konscion, en kiu troviĝas peza religia mistero, kruda belo kun riĉa spirita enhavo neesprimebla per vortoj. Ĝuste la influo de tiu tradicia kulturo sur Dong Kejun kaj la perdo de tiuj valoraĵoj por la moderna civilizacio koliziis kaj koncipigis lin je ia profunda "interna spirita bezono", instigante lin verki "Alvoko", "La Tero", "La Varma Tero" kaj multajn aliajn.

"Alvoko" el bovakapo, kandellumo, homa vizaĝo kaj transpiraĵo de la tero superrealisme strukturis makroskopan koncepton solenan kaj ankaŭ tragikan, kombinis simbolon kun koncepto. En la mistera atmosfero ŝajne sonas krio de la animo plena de streba spirito nesubigebla, kaj la krio alvokas la revenon de la latentaj spirita forto en la fundo de la koro de la homaro. "La Varma Tero" spegulas, per varma kaj intensa intermiksiĝo de nigro kaj blanko kaj superrealisma fantazio, la medion de la ekzisto de la fortuloj kaj ilian obstinan vivkonscion.

La 52-jara Pu Guochang, vicprofesoro de la belarta fakultato de la Arta Kolegio de Guizhou-provinco, estas multescia kaj talen-

ta. Li estas ksilografo kaj okupiĝas ankaŭ pri olepentrado. Nun li sin dediĉas al kolora vaksa tinkturado.

Same kiel aliaj artistoj de Guizhou, Pu Guochang prenas la antikvan kaj misteran teron de Guizhou-altebenaĵo kiel fonton de sia verkado. Guizhou-altebenaĵo estas malgrasa, sed la vivformo prezentita sur tiu tereno estas senkatene gaja. Kantado kaj drinkado ĉiam akompanas geedziĝon kaj funebradon. La venkitojn en kantonkonkurso oni punas per drinkigo kaj farbado de iliaj vizaĝoj. Tia moro bildigas la gajan kaj humuran vivon de la naciecoj de Guizhou. Pu Guochang trafe enkorpiĝis tiujn morojn en siaj verkoj, tial liaj verkoj karakteriĝas per orienta humuro de la ĉina popola arto.

Laŭ bezono de kreado, Pu Guochang prenis metamorfozon kiel sian ĉefan artan koncepton. Tamen li opinias, ke metamorfozo ne estas formala ludo, sed esprimo de akcento de la naturo de la arto, ke la plej esenca karakterizaĵo povas malkovriĝi nur post forigo de akcesoraj kaj banalaj faktoroj kaj troiga elstarigo de la plej karakteriza flanko. Metamorfozo estas unu el la metodoj de kreado de artistoj malkontentaj pri la realo. Liaj ksilografaj "Kosmo" kaj "Ekĝermado", impresantaj per vigleco kaj humuro, eniras en prudentan pensflugon, kun fortega spontanea arta fascino.

Cao Qiongde (Caŭ Ĉjongde) estas la plej juna el la artistoj de Guizhou.

Printempe de 1989 la 34-jara Cao montris en Pekino siajn pentraĵojn de nova speco, kio vekis nemalgrandan sensacion. Unu el la kritikistoj diris: "Kiam mia rigardo balais sur liaj pentraĵoj, mi tuj sentas, ke al miaj sensoroj je tiĝas superba akordo pro kunfrapiĝo de malmolaj solidajĵoj."

La metodo de pentrado de Cao estas rekta ŝuto de olefarboj sur ŝĵuan-paperon (Ĉina produktaĵo speciale farita por ĉinstila pentrado). Samtempe li enmiksas ankaŭ teknikojn de ksilografio, olepentra-

do, ĉinstila pentrado kaj pentrado de akvareloj. Lia pentrado estas tre komplika, sed tre libera laŭ la volo.

Cao Qiongde estas introvertito sensiva. Li estas solinfano, kaj la patrino emis reteni lin en la hejmo por eviti eventualan akcidenton. Pro tio la naturo estis tre fremda al li. Kiam li elkreskis kaj havis la ŝancon kontaktiĝi kun la naturo, lia tuta animo estis altirita. Li diris: "Inter la homo kaj la naturo ekzistas io subtila, neklarigebla per vortoj."


Lia karakteriza travivaĵo stampis liajn pejzaĝajn pentraĵojn per evidenta personeco. Liaj pentraĵoj bildigas ĉefe ŝtonajn dometojn, heliantojn, zigzagajn vojojn, arbojn, bubalojn kaj stalojn ofte vidatajn en montaro de Guizhou, sed la pentraĵoj prezentas esence la finan konscion de la aŭtoro pri la tuta naturo kaj la vivo.

La pentristaro de Guizhou insistas en sia propra arta stilo, kun fortega spaca konscio. Tamen en iliaj absolute malsamaj artostiloj videblas la animo ilin trairanta.

La kritikistoj opinias, ke la esploro de la artistaro de Guizhou pri la variemaj krudaj materialoj de belarto starigis standardon por la nuna pentrista rondo.

Liao Zhihui (Ljaŭ Ĝihuj) gravuras kaj pentras sur kalabaso. Konforme al iliaj konvekseco kaj konkaveco kaj la longo de ilia petiolo, li faris seriojn da vizaĝodesegnoj de teatraj roloj. Skulptisto Liu Wanqi (Liŭ Ŭanĉji) prenis la flavverdajn radikojn kaj radiketojn de bambuo kiel vizaĝojn, brovojn, lipharojn kaj vestojn. Cermikisto Yin Guangzhong (Jin Gŭangĝong) bone konas la karakterizaĵojn de ceramiko kaj skulptis multajn terurajn figurojn de diabloj. La kolora vaksa tinkturado de Ma Zhengrong (Ma Ĝengĝong), la skulpturo de Tian Shixin (Tjan Ŝiŝin), la krudligna arto de Chen Baiqiu (Ĉen Bajĉiŭ), ĉiuj montris la kreivon de la aŭtoroj en uzado de materialoj.


La arta stilo de la pentristaro de Guizhou fontas el du sistemoj de la



Serio da lignaj ĉerpiloj (Metiartaĵo)
de LIAO ZHIHUI

popola arto: Unu estas milda vaksa tinkturado kaj brodado, kaj la alia estas lokaj teatroj apartenantaj al la religia kulturo. La maskoj en la teatroj akcentas troigon de konkreta percepto, ŝanĝiĝemon de la trajto, fluecan sed fortan liniaron kaj modestan kaj bravan konkavecon kaj konveksecon. Akordigante sin kun la pasia epoko, la artistaro de Guizhou pli multe ensorbis la ekstrakton de la dua sistemo kaj prezentis la artan karakteron de primitiveco, mistereco, profundececo, antikveco kaj humureco.

Tiu granda familio ne havas evidentan formon de organizo, nek artan programon kaj deklaron. Ĝi estas artista kolektivo nutrita de la originalaj lokaj moroj de Guizhou.



"Paŝtisteto kaj Ĉevaloj" (Ĉinstila pentraĵo)
de **PU GUOCHANG**

"Stratoj en Vilaĝo" (Pentraĵo)
de **CAO QIONGDE**




"Knabino" (Lignogravuraĵo)
de **LIU WANQI**



Sceno el loka teatro (Vaks-tinkturaĵo) de PU GUOCHANG

"La Tero" (Ksilografaĵo) de PU GUOCHANG



Sekvu la "Spurojn de Amo"

de SU LIPING

"Spuroj de Amo" prezentita de la Kanto-danca Ensemblo de Yunnan-provinco konigis per dek dancoj la geedziĝajn morojn de sudaj nacimalplimulto. La graciaj kaj viglaj dancoj, la originalaj geedziĝaj moroj kaj la pura kaj arda sento de la popolo disemis varmon de amo en la koro de la rigardantoj.

Sur la mistera tero de Yunnan 25 nacimalplimulto komponis ĉarmajn amkantojn sur la ĉefmelodio de amo: Junuloj de ajnacieco devas atendi elekton de knabino sub la helpo de poŝlam-po; en tago membroj de mosogento ĉe Lugu-lago povas kunesti nur kun samseksuloj, kaj la geamantoj rendevuas nur en nokto; geamantoj de ĝingpo-nacieco ŝatas reciproki iajn vegetalojn kiel amleterojn; gejunuloj de muĝi-gento

de jinnacieco interkomunikas korinklinon dum rukulado per fajfado; membroj de ŭa-nacieco loĝanta sur altaj montoj decidas edziĝon laŭ aŭguro de sonĝo... Por konigi tiujn morojn de edziĝo, la koregrafoj ne penis altiri per strangaĵoj, sed pene fosis iliajn internan belon per reverkado. En la danco "Karnavalo de Amo" la longa grupa danco kun troigitaj movoj kaj rapida ritmo sukcese montris la ardan amon de junuloj de jinnacieco. En la danco "Fiksloĝiĝo de Viro ĉe la Edzino" de moso-nacieco, la facila pardanco en nebula lunlumo, kiel klara roĝo, elfluigas torenton de amo. En la danco "Geedziĝo laŭ Aŭguro de Sonĝo" de gejunuloj de ŭa-nacieco, sincereco miksiĝis kun opono kaj kompromiso. La belo de la animo, la belo de esprimo de amo, la strebo al belo kaj la iluzio

de amo troviĝas ankaŭ en tragedio de amo.

Rigardate supraĵe, "Spuroj de Amo" konigas nur malsamajn morojn de edziĝo de la nacimalplimulto de Yunnan. Sed rigardate de alia direkto, tiuj moroj spegulas parton de la historio de la homa amo, la spurojn de la homa amo. Ekzemple la kulto en la danco "Legendo pri Amo" spegulas la adoradon de la homoj al dioj kaj genero; geedziĝo de gefratoj en la tempo de ĥaoso estas antikva samsanga edziĝo de la homaro; la karnavalo de jinnacieco karakteriĝas per evidenta postsigno de grupa geedziĝo; la fikslloĝiĝo de viro ĉe la edzino fakte estas matriarka postsigno. La koregrafoj lerte tekis la historion de la homa amo kaj edziĝo el la geedziĝaj moroj de diversaj nacimalplimulto, nome la evoluon "samsanga geedziĝo — grupa geedziĝo — monogamio", montrante per tio la evoluon historion, la sociajn karakterizaĵojn, la kulturalan tradicion kaj la naciajn karakterojn.

"Spuroj de Amo" konsistas el grupa danco, pardanco, soldanco kaj solo. Krome la danco "Legendo pri Amo" asimilis la operan rimedon, dum "Geedziĝo laŭ Aŭguro de Sonĝo" enprenis en sin la lingvon de moderna danco. La melodioj kun freŝa nacia gusto harmonie unuigis la dancojn, kaj la figuroj integraj kaj nekompletaj simbolantaj feliĉon kaj malfeliĉon aludis la temon de la danco. Ĉio tio dotis la dancon per variaj formoj kaj riĉaj enhavo kaj esprim-povo.

Sceno el la danco "Edziniĝo en Florado"





Sceno el la danco "Legendo pri Amo"

Sceno el la danco "Voko de Amo"







Sceno el la danco "Bela Amo"

Sceno el la danco "Karnavalo de Amo"

Sceno el la danco "Fiksloĝigo de Viro ĉe la Edzino"





Sceno el la danco "Geedziĝo laŭ Aŭguro de Songô"

Sceno el la danco "Novgeedzoj Dancas inter Bovloj kun Vino"



FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ



En milito inter Irano kaj Irako de SAHROŬ FARZAD (Irano)

Montoj de Tabrizo de Irano en malvarma vintro de SAHROŬ FARZAD (Irano)

